HUNGARA VIVO

2

1969

8,—Ft

»TECHNOIMPEX«

HUNGARA MAŜININDUSTRIA ENTREPRENO POR INTERNACIA KOMERCO

EKSPORTAS:

ilmaŝinojn
kablomaŝinojn

maŝinojn de telekomunika tekniko
maŝinojn por plastaĵoj



PETU DETALAJN PROSPEKTOJN PRI NIAJ FABRIKAĴOJ

Budapest, V. Dorottya u. 6. – Budapest 62. P. O. B. 183 Telefono: 184–950
180–830 Telegramo: Technoimpex Budapest 994, 995, 617

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara Esperanto-Asocio

Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

☆

1969, IX-a jaro, 2-a numero

Mihály Gergely: Renoviĝi 1
Sándor Somogyi Tóth: Koni. Tr. L. Tárkony .. 2
d-ro *Ferenc Jáki:* Kiel mi malkovris la finnan-hungaran lingvoparencecon inter la mankantaj kornoj de la bovino? 4
Nuntempa hungara poezio
Mihály Váci: Luno kaj stelo polusa 11
Sándor Csoóri: Ke mallume ne estu 11
Sándor Rákos: Heredaĵo, Sovaĝbesto 23
Tradukis: Kolomano Kalocsay
Valeria Szabó: Panoramo 6
Lajos Lesznai: Nova hungara opero — Hamlet 8
Sándor Szathmári: Tria preĝo de Pygmalion .. 9
La plej eminenta hungara lingvisto — esperantisto 12
Ervin Fenyvesi: Vojo al novaj medikamentoj 14
Mihály Gergely: Afiŝarto de 1919 16
György Moldova: La turnebla soldato. Tr. L. Tárkony 18
Gasta paĝo — Hilda Dresen 19
Famaj hungaroj en la mondo — *Albert Szent-Györgyi* 20
Aurél Ponori Thewrewk: La plirapidiĝanta tempo 22
K. Kalocsay: Domfabriko 23
d-ro *István Bácskai:* La konstruiĝanta Budapeŝta Metro 24
Nia humuro 25
d-ro *István Szerdahelyi:* Metodo kaj metodoj 26
Gábor Vigh: Muzika edukado 29
Korespondi deziras. — Recenzo 29
L. Kökény: Leterkesto — El la leteroj 30
El la 3-a numero de Hungara Vivo 31
Glosaro 31

Sur la kovrilpaĝo — *Bertalan Pór:* Por edzinoj, infanoj, antaŭen!

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro: *d-ro Jozefo Mátéffy*
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
d-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bálint, Imre Botos, Ervin Fenyvesi, Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, Valeria Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Ujlaky-Nagy

Ĉefkunlaborantoj:
D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Kolomano Kalocsay, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.
Telefono: 224—819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I., Budapest, V. József nádor tér 1.) senpere, aŭ per ĉekenpagilo, por individuaj abonantoj la ĉeknumero estas 61 280, por neindividuaj 61 066.

La abono estas por jaro Ft 32.-, al eksterlando krome Ft 6.-40 poŝtelspezo.

69.66848 Akadémiai Nyomda, Budapest
Responda gvidanto: György Bernát
Indexszám: 7253

Renoviĝi

Ideoj pri la neceso de iu internacia, pera lingvo anonciĝis jam antaŭ jarcentoj. La ideo en la lastaj jardekoj manifestiĝis. Pasos ankoraŭ dek-dudek jaroj, kaj estiĝos la solvo de la problemo ne plu prokrastebla. Pro la scienca-teknika revolucio kaj la sociaj transformiĝoj, la interrilatoj de la popoloj kreskas rapidege, la sciencaj publikaĵoj aperas ĉiujare en pli ol centmiloj — do, pruviĝos la ne plu irebleco de la malnova vojo. Hodiaŭ jam evidentiĝas la kolektiva akcepto de iu neŭtrala, internacia lingvo. Esperanto, vivanta de okdek jaroj, prezentiĝas natura solvo de la problemo, kaj ĉi tiun fakton akceptas pli kaj pli multaj ankaŭ el la eksteruloj.

Konsiderenda, kion ni, esperantistoj povus fari ĝis la komuna aranĝado de la lingvoproblemo. Pro tio — ĉar laŭ mia opinio nia movado bezonas la renoviĝon, por ke ĝi povu esti ĉiam pli iniciatema, intensa por uzado de Esperanto en la socia vivo — Hungara Vivo inklinas malfermi diskuton pri la temo, publikigi la utilajn alparolojn. Enkonduke, mi deziras doni kelkajn pensojn.

Mi kredas, antaŭ ĉio tio estas grava, ke nia movado larĝigu sian kadron plu, ĉesigu la troveblan izolitecon, por ke ni trovu la pli bonan kontakton kun la simpatiantoj en diversaj terenoj, kun la fakaj scienculoj, artistoj, lingvistoj, ĵurnalistoj, kaj ankaŭ kun la ŝtataj kulturaj, ekonomiaj funkciuloj de la landoj. La realigo de tiu celo bezonas la publikan, ne nur en la E-rondoj izolitan vivon de la movado.

Ni povos atingi tion relative facile: la E-asocioj de la landoj formu siajn informilojn, la simplajn bultenojn dulingvaj (patralingva kaj Esperanta) gazetoj, kiuj estu disvastigeblaj ankaŭ sur la strato, ke ĉiu povu aĉeti ilin, do, ankaŭ la nemovadanoj — laŭ volo kaj plaĉo — povu ekkoni Esperanton.

Ĉiujare, okaze de la U. K-j, la sciencaj kaj fakaj E-asocioj regule interkonsiladas — tamen, iliaj rezultoj restas en la kadro de la E-movado, publikiĝas nur en la lingvo Esperanto. La dulingvaj ĵurnaloj servus ilian nacilingvan aperon en ĉiu lando, kaj per tiu fakto ili povus servi la propagandon ankaŭ en la neesperantistaj rondoj.

Bezonate estus, ke la diversaj E-fakuloj aranĝu konferencojn — krom la mondkongresoj — eble inter la najbaraj landoj, aŭ pli vaste, internacie, pojare, kaj al tiuj konferencoj oni invitu, kiel gastojn, ankaŭ la simpatiantojn el la samfakuloj de la lando.

Renoviĝi kaj scii renoviĝi: tio estas hodiaŭ la plej grava, kion nia movado devas fari. Esperanto, ekde sia naskiĝo neniam staris tiel proksime al la celo — sonĝita de Zamenhof — kiel hodiaŭ, por ke ĝi estu la grandega peranto inter la popoloj, solvanto de la malnova kaj malbenita, babela lingva stato.

Mihály Gergely

Sándor Somogyi Tóth

KONI

Kara Magda! Mi restas. En la telefono mi ne volis vin kompromiti, via patrino staris apud vi kaj subaŭskultadis. Niaj interkonsentoj disfalis, kaj senpersonece ni ne povas vivi unu kun la alia. Ni supozu, ke la kulpo estis en mi. Sed kio estas tio: kulpo? Mi volis proksimume tiel vivi, kiel antaŭ nia geedziĝo. Kaj vi volis alimaniere. Pri tio mi povas nur bedaŭri, ne helpi.

Diskrevas mia kapo! Ni ambaŭ havis apartan ĉambron antaŭ ol geedziĝi. Jen ekzemple via olda paĉjo . . . de tridek jaroj li havas astmon, hojlante li prenas la aeron kaj eĉ predikas pri akomodiĝo. Mi ne povas lin akuzi, sed ke liaj pulmoj flutadas, tion oni devas aŭskulti. Mia intelekto estas komprenema tute ĝis la romantiko, sed miaj nervoj... Mi desegnis linion, la oldulon kaptas atako, li enspiras iom da turmenta el la aero, mia krajono tuj rompiĝas en la lakmuson, ĝi rompiĝas, Mia Dolĉa, bombfunelo sur la lakmuso... Mi povas komenci de antaŭe. ,,Mia Dolĉa'' . . . Jen ankoraŭ io bona. Almenaŭ ŝi ne dirus ĝin naŭdek-kvinfoje tage, mi furiozas kontraŭ mi mem, ĉar min nervozigas, ke via patrino alparolas nin tute senenhave, la maŝinoj, je l'honoro, jam delonge ne estas tiel maŝinecaj, kiel la homoj kun siaj ŝablon-esprimoj. Pro tio diskrevas al mi la kapo. Kaj la tuta putra erburĝa societo, kiu tie kolektiĝas preskaŭ ĉiun vesperon! Mi decidis, ke bremsate mi skribos al vi, sed tio nun jam ne estas ebla. Kun vi tamen mi havas ian ordinaran homan rilaton. Ni ,,nunaj gejunuloj'' iele-tiele . . . ,,ĉi tion ne scias, tion ne scias''. Kion ni ne scias? Kaj entute: kial tio estas interesa? Antaŭlonge estis mizero, poste la teruraĵoj de la milito kaj la reĝimo de Rákosi, kiam oni nepre devis aplaŭdi. Ili operacias en la ventro de l'animo, dresas siajn skarabojn, la tempo kuras. Diskrevas mia kapo. Mi revidas en mia imago la multajn pratempajn kretenojn, kiel ili aplaŭdas kun taŭzita muzelo, ĉar ili nepre devas. Kio do, ke oni nepre devas? Aplaŭdi? En la peston tiujn ĉi ŝimajn azenaĵojn! Ĉe la cent-naŭdek-oka ripetado mi ekkriegis, vi memoras. Kaj eksplodis skandalo, kiel ĉiam, se mi ekparolas. Ankaŭ vi tiel min alrigardis kiel murdiston, vian patron kaptis atako, via patrino klukis, la fosiliaj estaĵoj min sturmis, rikane ili min instruis pri la vero — estis bonege! — fine ili subite adiaŭis. Ĉar anstataŭ pardonpeto mi ridaĉis. Kion mi faru? Via familio kredas, ke mi, kun miaj dudek tri jaroj estas ia edukproblemo. Tio por ili ne estas aĝo. Cetere mi legis pli da libro, ol la familio kaj la amika kompanio kune, escepte vian pli aĝan fraton . . . Punkto. Fino. Ili prokrastu, ĉar por ili la tempo ne kalkulas. Aŭdu: intence ili ĉiam prokrastadas, ke ili ne devu pensi, ĉar la pensado tamen estas bona por tio, ke senmaskiĝu kelkaj bazaj idiotaĵoj. Feliĉe la tempon oni ne povas laŭplaĉe returnadi. Tuj oni malkovrus, ke la nuna junularo estas respondeca pro ĉiuj mondmilitoj. Mi finis tiun ĉi temon.

Atentu nur, Magda! De unu horo mi turmentas mian cerbon kaj nun estas al mi suspekte, kial mi klaĉas tiom pri la familio. Kiom gravas la familio! Temas pri ni. Pri ni ambaŭ.

De tri jaroj ni iradas kune, antaŭ tri monatoj oni aranĝis la grandan Ceremonion, sur la Bulvardo, per tio ili permesis, ke ankaŭ plu estu inter ni, kio ĝis tiam estis. Nu, tio havas ja lokon por si inter la aliaj idiotaĵoj, sed tiam mi komencis atenti. Tro granda estis la ĝojo. Bone, ili ĝoju. Sed sub la preteksto de la granda ĝojo inside ili kunfermis nin en aĉan ĉambron, en komunan liton, sub komunan elektran lumon. Kune maldorme, kune dorme, kune sendorme. Unu el ni estas febra, kunŝvitas la alia. Kaj Vi, Magda, ĉiam estas varmega, kaj mi, — tio sonas idiote, sed ne gravas, — mi ne povas dormi apud varmega korpo. Kaj la elektra lumo. Ripozo bezonas mallumon, laboro lumon. Banalaĵo? Jes, sed oni tion ne povas ŝanĝi. Mi desegnas, vi ĵetiĝadas sur la lito, ĉar ni estas geedzoj . . . Min ĝenas, se mi ĝenas alian. Mi murmuradis, petis apartan liton — mi ricevis predikon pri akomodiĝo, kaj la konfuzan ,,nesto''-teorion, kies esenco estas tio, ke aparte loĝi-dormi estas egale al malmoraleco. Nu, jes. Tiel pli facila estas la kontrolado. Bonaj etaj familiaj veroj. Diskrevas mia kapo. Laŭ mi la zono de ĉasteco havis multe pli da senco mezepoke . . . Nu jes, Magda. Sen vi ne kolektiĝus tiu ĉi idiotaĵ-aglomero. Ankaŭ vi kvalifikis ,,nesto'' la ĉelon. Jam ankaŭ la idojn vi mendis, precize cent kvindek aludoj forsonis; al la krepitado de via patro kaj al via ĵetiĝado mankus ankoraŭ la beboplorado. Ĉefas la sekureco. Ĉiu laboris por tio, ke la ,,nesto'' transformiĝu en kaptilon. Ankaŭ vi. Mi estas bruska, povas esti, sed Vi povas esti certa, ke mi diras ĝuste tion, kion mi pensas. Ne tiuj kelkaj praestaĵoj estas miaj diskutpartneroj, sed Vi. Neniam vi kontraŭdiris al la koncepto de ,,nesto''. Plaĉas al mi, se oni mutiĝas. Evidente Vi pensis, ke la vivo flankenstarigos min. La preta situacio. La infano. Vi ne konas min, Magda, ankoraŭ ĉiam Vi ne konas min. Oni ne povas min nokaŭti per tiaj antikvaj sentoj. Mi vidas tiujn multajn lamajn kuniklojn, kiuj ĉiuj volis esti grandaj matadoroj. Kaj kio fariĝis el ili? Kuradanta nervoza movadoro aŭ kulio de la Familio. Eventuale samtempe ambaŭ. Ekzemple Via pliaĝa frato. Dek jarojn li donis al la movado, dek jarojn al la familio — kaj ,,mi ne domaĝis tion''. Rigardu lian ĉifitan muzelon, en liaj okuloj estas manio de persekuteco, liaj nervoj estas disŝiritaj, eĉ labori li plu ne povas. Nu jes, ankaŭ la konscio de la kripluloj estas estiminda, pri tio mi ne diskutas, oni nur estimu ilin. Kaj mi iru sur mia propra vojo. Ĉu jes? Ĉi tie ne estas moralo, mia kara. Aŭ per Via tuta forto Vi iras al via celo aŭ vi iras en kretenan kaptitecon kun Mozeo-korbo, kun odoro de bebvartejo, kun malsana infano. Kaj hejme vi estos besto, ĉar vi plu ne havas forton resti homo. Ne diru, ke mi silentas pri la ĝojoj. Ankaŭ vi scias, komprenas: en la ĉaspelo ne estas loko, tempo, nervo por ĝojo. Sed kial mi sekcas mian cerbon? Mi vin forlasis, kaj en nenio vi volos min kompreni.

Ni ne estas unu por la alia, kredu. Vin oni ne akceptis en la universitaton, kaj tio ne estas mirinda. La trian fojon vi

ŝanĝas ,,fakon'' – plej laste la kuracpedagogion vi prenis en vian kapon. Mi kredas, fine vi volus fariĝi familipatrino. Ĉefprofesie! Estas en ordo. Via milda sentimentaleco kaj etburĝa pigreco estos en harmonio kun via alvokiĝo. Kaj ĉu mi estu ankoraŭ pli sincera? Temas ne nur pri tio, ke vi ne povas veni kun mi. Simple min tedis tiu ĉirkaŭaĵo. Ankaŭ vi mem, per via sentimentaleco. Tio ĝuste estas sufiĉa kaŭzo, mi ne volas ĝin, estas prete. Kaj memoru, ni interkonsentis. Se mi volas foriri, mi foriros, se vi volas iri, ankaŭ Vi iros.

Dum tri monatoj mi loĝis en la strato Pomo. Mi forgesos tion. Iu loĝis tri monatojn en la strato Pomo. Ankaŭ Vi forgesos tion. – Dum unu tago Vi estos animskuata, poste tio pasos.

La detalojn de la eksedziĝo ni priparolos en pli trankvilaj tempoj, se forpasos la miraklo, kiun la praestaĵoj dum tri tagoj gapos buŝmalferme.

Miajn librojn, kiuj restis ĉe vi, bonvolu sendi al mi, *L.*

*

Laĉjo! Estas malfacile eĉ imagi, ke tiu ĉi mizera rezonado naskiĝis en via kapo. Mi hontas, sed ne pro tio, ke mi restis en honto, kvankam kompreneble ankaŭ tio okazis, sed mia patrino konsternite kuradas en la loĝejo, kaj mia patro simple ne volas ĝin kredi – kaj la knabinoj ridaĉos... Kio do okazis, Laĉjo mia, pro dio? Mi ne povas rekonsciiĝi, koŝmaro ŝajnas via fuĝo, kun tiu ĉi malnobla, jes, malnobla letero, kiu eble estas ankaŭ mensoga. Vi kaŝas ion, ĝi ne estas Via vizaĝo, ĝi ja estas taŭzita! Ne, tamen ne, mi tute konfuziĝis, via sovaĝa krudeco estas ties plena garantiaĵo. Se vi havus virinon, ankaŭ tion vi konfesus sen palpebrotremo. Estas malesperige, ke ĉion oni devas preni serioze, kion vi skribas en via terura letero kaj tamen iel ĉio signifas ion tute alian . . . Mi devas repreni miajn fortojn kaj kompreni, kio okazis. Mi freneziĝis, nun subite venis en mian kapon, ke ni priparolos kun Vi, kio estas Via opinio . . . mi turnis min al la skribotablo, kie Vi kutimis sidi. Min sufokas ploro, sed mi ne volas plori. Fremdulo sidis ĉi tie ek de nia geedziĝo kaj kun fremdulo mi renkontiĝis ĉe la flanko de Tabano dum kvar jaroj. Kvar, aŭdu, ne tri, unu jaron Vi defraŭdis! La duan de marto estos la kvara jaro.

Tiuj ĉi friskaj muroj, miaj tremantaj manoj, eĉ ne mi mem sidas ĉi tie, ŝiradante la paperon, falsa kaj idiota estas ĉio. Kiu estas ĉi tiu krudvizaĝa, ekscitiĝinta figuraĉo? De horoj mi faras tion, kaj estas terure, ke sola mi devas ĝin fari, ja de mia deksesa jaro mi alkutimiĝis vidi per viaj okuloj, klopodi pensi per via kapo – tio estas finita. Mi provas memori. Jes, ŝajnas al mi, ankaŭ tiam mi konis vin, kiam matene aŭ vespere ni renkontiĝis sur la vojo Hegyalja, sur la strato Csaba. Mi konis, sed – imagu – mi amis la nervozan tikon sur via vizaĝo, kiu aperas, kiam io vin ne interesas. Vi ne sekretigis: ,,Tio speciale ne interesas min'' – kaj nun konsterniĝante mi elaŭduas ion el via tiama voĉo, jes, la teroro en ĝi krakis. Kelkfoje ankoraŭ mi kuraĝis diri: ,,Aŭskultu tamen, ĝi min interesas.'' Poste mi mutiĝis kaj fariĝis via pasiva aŭskultanto. Tiun rolon vi donis al mi. Kiel stranga, nekomprenebla ŝajnas nun tiu montflanko, la sunsubiro, la gruzera vojo, la benko, kie ni interkisadis, la blanka Elizabeta ponto: nuraj kiĉaj dekoracioj, kaj estas pli bone pensi je la krepusko, en kiu malaperis la du fremduloj, kiuj kredis, ke ili apartenas unu al la alia.

Jes. Dum tagoj vi min devigis je silento. Ne pro via laboro, sed ĉar vi havis malbonan humoron. Mi enuis. Mi enuis sub ordono – kaj tion mi ne volis rimarki. Ankaŭ plori ne estis permesite, vi ne akceptas, ke al la nervostreĉiteco oni povas reagi ne nur per sovaĝa furiozo, sed ankaŭ per alia natura maniero, ekzemple per ploro. Vi ne kutimas plori, por vi ne ekzistas la ploro. Ĉiujn dancejojn oni devas eksplodigi, ĉar ilin vi ne ŝatas. Kio ne estas bona al vi, tio estas malbona por ĉiu, ĝenerale, por la tuta mondo, do ili tuj detruiĝu, ĉar alikaze ,,diskrevas via kapo''. Kompreneble la aĵoj ne detruiĝas sub ordono kaj nun horore mi rememoras, ke dum noktoj en la silento knake grincadis viaj dentoj, mi vin karesis, ke vi vekiĝu, ke la furiozo ne diskarnu vin en via sonĝo. Ĉion ĉi mi travivis, estas strange. Nun tamen turmentate mi elektadas el la tempo viajn furiozojn, vantaĵojn, perfortaĵojn. Mi erarvojis ie en vi, simple tial, ke . . . sed tion mi ne skribos, tio ne havus sencon. Kaj ankaŭ nun ne tial mi reserĉadas, ke mi faru kulpoliston – kvankam la kulpuloj vere meritas, ke oni nombru iliajn kulpojn, ankaŭ mi meritas, ke mian amon vi nomu sentimentaleco, kaj miajn feliĉajn sentojn pigreco.

Estas malbone kaj humilige, ke vi povas min devigi je meditado. Mi turnadas ĉi tiun leteron idiotan, egoistan, maldignan – al homo maldignan, kiu per sia malnobleco, per sia malnobleco imagita kiel moderneco . . . Sed kial mi turmentas min. Via fuĝo kaj la letero estas same neverŝajnaj, sed tamen ili ambaŭ iel verŝajnigas unu la alian.

Mi komencas trankviliĝi. Mi perdis tion, kio ne estis, ne povis esti la mia, simple pro tio, ĉar mi ne pretendas ĝin.

Nur tion mi devus honti, ke malfrue, nur nun mi tion eksciis. Sciiĝu, via konduto estas sordida – kaj iel eĉ kirlas la sordidaĵon. Mi tre amas mian patrinon. Sed kiam ŝi konsilis al mi, ke mi skribu al vi, ke mi estas graveda de tri monatoj, – mi havis emon kun miaj dek ungoj ĵetiĝi al ŝia vizaĝo. Tamen ŝi havas ankoraŭ senkulpigojn. Sed Vi, vi moderna praestaĵo, kiel vi paliĝus, se tiun ĉi minacon mi sendus al via adreso! Ne maltrankviliĝu! Se mi estus graveda, ne armilon mi portus en mia ventro, sed veran bebon. Ĉar la infano ne estas ,,konceptaĵo''. Vi diris foje, en la Friska Valo, sub morusujo klinante vin al mi: Mi volus malgrandan modelon el vi, el viaj haroj, el viaj okuloj . . . kaj daŭrigon: la daŭrigon de la saĝeco. Kompreneble la daŭrigon de Via saĝeco.

Nun jam mi ne volus tion. El tiu ĉi saĝeco ankaŭ tio estas multa, kiom vi akiris.

Mi estas laca, tion mi ne negas, iom malplena estas la mondo. Sed ne mankos Vi, kiu vi estas, maksimume iom mankos tiu, kiu vi estis, kiu mi vin imagis. Venas mia frato. Jam ankaŭ li scias, ke mi restis sola. Mi ne hontas tion antaŭ li. Multe li suferis, batalis, kaj ne nur por si, tial vi rikanis je li, ĉar lia humaneco estas por vi malamata sekreto.

Vi skribas, ke je certa grado de la celkonscio ĉesas la moralo. Ne flatu vin mem. Tio ne estas celkonscio, vi estas simpla, malgranda universitatano, kiun kaptis kariernervozeco. Kaj ĉe tiu ĉi grado de la kariertimo ĉesas la homo . . . sed ni jam lasu tion.

Viajn librojn jam hodiaŭ mi enpoŝtigos.

Magda.

Tradukis: L. Tárkony

Kiel mi malkovris la finnan-hungaran lingvoparencecon inter la mankantaj kornoj de la bovino?

Kiam mi ekaŭdis, ke Finnlando ricevis la rajton por aranĝi la 54-an Universalan Kongreson de Esperanto, denove reviviĝis en mi tiuj belegaj semajnoj, kiujn mi antaŭ kelkaj jaroj pasigis en diversaj urboj de Finnlando. Mi ne scias, kioman lagon ni jam pretereiris aŭ transnavigis inter Lahti kaj Tampere, en la ,,Lando de mil, aŭ pli precize, de sesdektri mil lagoj", kiam fine kun mia amiko kaj gastiganto, Taisto Suontaosta ni alvenis al la malgranda kampkorto de lia patrino, kaŝita inter pinoj kaj betuloj. Krom la granda pureco pleje tio vekis mian atenton, ke la bovinoj ne havis kornojn. Mi demandis de Taisto esperantlingve: ,,Kial ne havas la bovinoj kornojn?" El la frazo — ĉar tiam li estis ankoraŭ komencanta esperantisto —, li ne komprenis la vorton: ,,korno". Mi montris al la kapo de la bovino, poste al la mia, ke nek ĝi, nek mi havas tion. Tuj li komprenis kaj ĝoje ekkriis finne: ,,Sarvy!" Je tio mi ekkriis eĉ kun pli ĝranda gojo hungare: ,,Szarv", kiu signifas: ,,Korno"! Tuj ni rakontis al la panjo, kiel perfekte ni komprenis unu la alian kaj ankaŭ ĝojis, ke inter la mankantaj kornoj de la bovino ni malkovris la finnan—hungaran lingvoparencecon . . .

Aŭtoveturante en rean direkton ni vizitis la foiron en Orimattila. Dum la rigardado miaj okuloj fiksiĝis je la popolornamaĵaj vazoj, terakotaĵoj. Taisto interpretis mian demandon al la metiisto: ,,Ĉu estas manlaboraĵoj tiuj ĉi multaj, belaj vazoj?" La metiisto memkonscie respondis finne: ,,Kyllä, käsintehty!" (,,Jes, manlaboraĵo!") Tre plaĉis al nia metiisto, kiam ni klarigis al li, ke la finna vorto" ,,käsi" (mano) hungare estas ,,kéz". Li eĉ donacis al mi fajnan malgrandan vazon . . . Mi vizitis ankaŭ la urbon Heinola, kie mi estis gasto de Eero Laitinen. Kiam mi el Heinola devis reiri al Vääksy, la tuta kara familio de Eero akompanis min al la ŝipstacio. En la stacio surprizite mi legis la surskribon de la tabulo ,,VESIBUSI", kiu hungare estas ,,VIZIBUSZ", (Surakva buso). Sur la akvobuso dum kvar horoj mi vojaĝis inter la plej belaj insuloj kaj mi havis tempon pensadi pri tio, kiel malfacile kaj longe devis batali la sciencaj esploristoj, ĝis ili sukcesis konvinki per la lingvoscienco la publikan opinion pri la finno-ugra, kaj en ĝi pri la finno—hungara lingvoparenceco. Ni faru iom da rigardo al la genealogia arbo de la finno-ugra lingvo. Kiel ni vidas, el la finno-ugra pralingvo, kiel el trunko de arbo proksimume trimil jarojn antaŭ nia erao disiĝis la ugra kaj la finna-perma brancoj. En tiu tempo teritorio de cent kvadratkilometroj povis vivteni nur 5—10 homojn. Tio estis tiam la situacio inter la Volgo-kubuto kaj la Uralo-montaro, en la regiono de la riveroj Bjelaja kaj Kama, do en la prapatrujo. En la plurmiljara drivo de la popolmigrado la lingvon de la parencoj, kiuj iris malproksimen unu de la alia, trafis multegaj influoj, kaj la lingvo de tiuj disiĝintaj grupoj aparte formiĝis, evoluis, sed eĉ tiel ĝi konservis la plej esencajn trajtojn de siaj internaj laŭleĝecoj, kiuj estas la plej decidaj argumentoj.



En mia enkonduko kiel pruvoj rolis la vortoj ,,szarv, kéz, víz" ,,sarvy, kesi, vesi" (korno, mano, akvo), sed krome ni havas proksimume mil finno-ugrajn bazvortojn. La lingvoparencecon tamen decide ne tiuj pruvas, sed la internaj, komunaj leĝoj de la lingva sistemo. Tia leĝo estas inter aliaj la leĝo de la regulaj vokal-akordiĝoj. Ĉi tie la esenco estas ne la simila formo de la similsignifaj vortoj, sed la regula interrespondo de certaj vokaloj de la vortelementoj (afiksoj, deriviloj). En la finno-ugra morfologio nin atendas ankoraŭ pli da surprizoj. Ĉi tie estas ekzemple la diversaj finaĵoj de la lokadjekto: -n, do ,,házon" (sur la domo), -t, -tt: ,,Kolozsvárt, Pécsett" (en Kolozsvár, en Pécs), -l, do ,,hátul" (malantaŭ), -á, -é, -a, -e, -vá, -vé,-va, -ve: ,,ide, oda, hová, világgá stb.) ĉi tien, tien, kien, en la mondon) ktp. Ĉi tiuj estas troveblaj ankaŭ en la aliaj finno-ugraj lingvoj. Tre riĉan materialon ni trovas en la finno-ugra

vortaro: la pronomoj, la simplaj nombroj, la korpopartoj, la mineraloj, la nutrado kaj la vortoj de la parenceco, naturaj fenomenoj, bestoj, plantoj kaj ankoraŭ la vortoj de multaj kategorioj konvinke povas pruvi la lingvoparencecon. Sed tio ankoraŭ ne sufiĉas !

Bonvolu atenteme kompari la sekvajn frazoparojn: — post la „ĝemeligo" de la lingvoparencaj frazoj sekvas la Esperanta traduko ! — Hungare: „Hal úszkál elevenen víz alatt" — finne: „Kala uiskelee elävänä veden alla". (Fiŝo naĝas vivante sub la akvo.) — Hungare: „Háromszázhúsz hollószemű ebem vízen él" — en la vogula lingvo: „Hurem-sat-hus hulachsam ampen viten ali". (Tricent dudek miaj korvo-okulaj hundoj vivas sur akvo.) — Tio ŝajnas iom altrudita, sed ni pripensu, ke nun jam la hungaran lingvomemorajon: „Halotti beszéd" (Parolo super mortinto), kiu devenas el ĉirkaŭ 1200, ni komprenas nur „tradukita" en la nuntempan hungaran lingvon, kvankam ĝi estas nur apenaŭ sepcentjara lingvomemorajo. Do, komprenante tion, ni jam ne sentas tiom altrudita la supran hungaran—finnan-vogulan lingvoparalelon. Ni jam tute facile povas eĉ devas akcepti, ke la finno-ugra lingvoparenceco ne estas altrudita lingvoelartikigo, sed natura, logika, vivanta realo. Se dum lego de verkoj de niaj verkistoj, kiuj vivis apenaŭ kelkajn jarcentojn antaŭ ni, jam ni ofte bezonas tekstoklarigojn, tiam de la parencaj lingvoj, kiuj antaŭ pluraj jarmiloj disiĝis kaj de tiam aparte evoluis, vere ni ne povas deziri, ke kun niaj gastoj parolantaj nur finne, lapone aŭ alian parenclingvon, ni povu paroli nur hungare, ĉar parenco estas parenco, do ne estas lingva diferenco ! Tion eĉ la italoj, hispanoj, francoj aŭ kroatoj, poloj kaj rusoj ne povas deziri unu de la alia, kvankam ĉe ili pli strikta estas la parenceco kaj la disiĝtempo ne estas tiel malproksima.

Kiam mi finis miajn Esperantajn prelegojn en la somera universitato de la iama finna ĉefurbo, Turku, mi iris ripozi al Rovaniemi, en la sesdektria cirklo de latitudo, tio estas iom jam ĉe la Norda Poluso. Akompanis min tien mia finna esperantista amiko, Armas Honkanen el urbo Hyvinkää. En Rovaniemi ni renkontiĝis kun laponaj konatoj kaj jen la miraklo: spite al la lingva parenceco, la finna, lapona kaj hungara lingvoparencoj plej facile komprenis unu la alian — Esperantlingve ! Helpe de Esperanto mi sukcesis kompreni kaj traduki hungaren la komencajn versojn de la lapona himno. Tio iĝis la plej kara memorajo de mia vagado en Nordo. Kiam mi refoliumante nove-denove legas ĝin, tiu ĉi kanto kaj Kalevala ĉiam lulas min en la lingvan etoson de la hungara poemo: „Legendo pri la mirakla cervo." Ĝia aŭtoro estas János Arany, hungara poeto (1817—1882), kiu supozis, kredis kaj konfesis, ke ankaŭ la hungaroj nepre devis havi popolan praepopeon, similan al Kalevala. Se ni, parencaj popoloj ne estus disigitaj tiel malproksimen unu de la alia, espereble ankaŭ niaj lingvoj estus pli proksimaj unu al la alia. Sed nek la geografia distanco, nek la diversa historia sorto gravas. Gravas nur tio, ke ni kore kaj anime komprenu unu la alian !

d-ro Ferenc JÁKI



DUM VIA VIZITO EN HUNGARIO

la benzinstacioj de ÁFOR estas kompleze je via dispono

ÁFOR BENZIN-OLAJ

KOSSUTH-MUZEO EN ŜUMEN. La liberec-batalo de la hungara popolo en 1849 estis venkita de la Habsburgoj. La venĝo estis kruelega: la gvidantoj de la revolucio estis senescepte ekzekutitaj. La ĉefrolanto de la revolucio, Lajos Kossuth eskapis el la lando ĉe Vidin al bulgara (tiatempe turka) teritorio. Li kaj ĉirkaŭ 2000 elmigrantoj estis loĝigitaj en novembro 1849 en la bulgara urbo Ŝumen. La kolonio de la hungaroj poste vigle partoprenis en la bulgara komuna vivo kaj multrilate utile influis la ekonomian kaj kulturan nivelon. Inter aliaj, la elmigrantoj fondis la unuan bulgaran orkestron, ili mem organizis la unuan bulgaran teatron, fondis la unuan bulgaran bierfabrikon kaj aliajn industriojn.

Kossuth loĝis en la domo de la riĉa bulgaro: Dimitraki Madŝl Panoff. El tiu domo la bulgara ŝtato faris en 1949 muzeon, en kiu troviĝas kelkaj montrotabuloj kaj vitrinoj kun tre lerte kaj precize kolektitaj memoraĵoj. La ceteraj ĉambroj estas meblitaj laŭeble laŭ originala formo.

HUNGARAJ FAKULOJ – el urbo Szombathely – restaŭras la palacon de magistrato en Berlino sur Unter den Linden. La konstruaĵo estis detruita en la dua mondmilito, kaj nun estos historia artobjekto, en la kulturcentro de la urbo – pere de helpo de la hungaraj konstrumajstroj.

LA 21-AN DE MARTO komenciĝis la hungara kolora televid-dissendo *provizore por Budapeŝto kaj por ĝia regiono. La perado okazas per la franca Secam-sistemo, la riceviloj estas importaj – sed jam la hungaraj fabrikoj produktas la „Videocolor"-tv-ricevilojn, planitajn de inĝeniero Aleksandro Laszip.*

UNU KAJ DUONAN milionojn da litroj da *kuracakvo* trinkis la hungaraj kaj eksterlandaj gastoj pasintjare el la Budapeŝtaj resanigaj fontoj de la banejoj Rudas, Széchenyi, Lukács, ktp. La Budapeŝtaj kuracakvoj helpas por resanigi la spirorganon, ĉesigas la malsanon de stomako kaj tiun de la intestoj.

PANORAMO

EGON F. KENTON – La portanto de ĉi tiu nomo naskiĝis en Hungario kaj lia originala nomo estis *Egon Kornstein*. Li estis violonisto de la iama mondfama hungara arĉkvarteta ensemblo *Waldbauer*, kiu plej unue prezentis la I. kaj II-an kvartetojn de *Béla Bartók*. La lasta verko estas dediĉata „Au Quatuor Hongrois Waldbauer, Temesváry, Kornstein, Kerpely".

Post la unua mondimilito, en la jaro 1923. Egon F. Kenton elmigris al Ameriko, kie li vivas ĝis nun kiel profesoro de la muzikhistorio. Li verkis multajn interesajn kaj valorajn muzikhistoriajn verkojn, plej laste aperis lia verko pri *Giov. Gabrieli*, kiun verkon multaj fakuloj trovas eksterordinare nova kaj fruktodona por la internacia muzikscienco.

Antaŭ nelonge li donis rimarkindan intervjuon por la hungara radio.

ĈIUJARE EN JULIO komenciĝas la prezentadoj de la Subĉielaj Teatraj Ludoj en la urbo Szeged *– kio estas jam konata ankaŭ por la eksterlandaj esperantistoj. Ili konas ankaŭ la belegan dramon „La tragedio de l'homo" verkita de Madách. Tiun dramon oni povas ĝui en la subĉiela teatro ĉijare kun gast-artistino: Viola Thirring el Komarno (Ĉeĥoslovakio) ludos la rolon de Eva. – Alia interesaĵo estos dum la prezentadoj de la Subĉielaj Teatraj Ludoj de Szeged, ke la iama „eta kapelestro", Roberto Benzi estros la operon Carmen.*

PROF. D-RO JÁNOS HOLLÓ ricevis la francan Ordenon de la kavaliro de la Akademiaj Palmoj pro sia valora laboro en la agro-kemio kaj pro la bona kunlaboro en la hungara–franca scienca interrilato.

EKSTERLANDAJ GASTOJ vigle vizitadis Hungarion jam ekde la jarkomenco, multaj oficiale el ĉiu parto de la mondo. Inter ili estis Lila Hernandez, la ĉefsekretario de la Sindikato de Ĉilaj Pedagogoj, por informiĝo pri la hungara instruada sistemo.

Pri la hungara muzika vivo kaj muzikpedagogia-sistemo interesiĝis dum sia vizito en nia lando José Siqueira, prezidanto de la Asocio de la Brazilaj Muzikartistoj.

ANNA MOFFO – la mondfama itala operkantistino estis en Budapeŝto, kaj kun granda sukceso ludis en operoj Lucia de Lammermoor kaj Traviata. Krom tio, la spektantoj povis vidi ŝin ankaŭ en televid-programo.

AGROKTKOOPERATIVOJ-MILIONULOJ, troviĝas en Hungario, inter aliaj sur la granda ebenaĵo ĉe urbo Karcag. Laŭ la pasintjara rezulto la tieaj kvin kooperativoj havas posedaĵojn, en valoro de 301 milionoj da forintoj kaj la enspezoj de la anoj estis entute 76 milionoj da forintoj.

PANORAMO

MORTIGAS la verda lumo — per la ruĝa: kvarobla frukto! Venos la tempo, kiam la scienculoj donos „kolorrecepton" al la produktantoj, por ke ili produktu ankaŭ en la vintro malmultekostan kreskaĵon — pere de la fitotrono.

Fitotrono — tiel nomiĝas la senfenestra, hermetike fermita, klimatizita ĉambro, en kiu troviĝas apartaj niĉoj kun akre blua, flava, ruĝa, verda kaj flave-blanka lumoj; sub ili kreskaĵoj verdadas. Tian fitotronon ni trovas ankaŭ en la botanika ĝardeno de la Agrarscienca Universitato en Gödöllő, kie scienculoj faras la eksperimentojn por konstati, kiel influas la diverskoloraj lumradioj la kreskadon de la vegetaĵoj.

La eksperimentoj pruvis, ke la kreskaĵoj ne egale „ŝatas" la kolorajn lumradiojn — alivorte, per la ŝatata koloro oni povas influi la kvaliton kaj kvanton de la organika materio. Kelkaj ekzemploj: la verda lumo mortigas la maizon kaj ankaŭ la pizon, sed la flava-blanka lumo duobligas la produkton de la maizo; pere de la ruĝa lumradio oni povas atingi kvaroblan produkton de la pizo. Per la koloroj oni povas influi ankaŭ tion, ke la organika materio en kiu organo de la kreskaĵo kaj en kia proporcio akumuliĝu, alivorte: ĉe la rapo en la radiko, ĉe la brasiko en la folio estu kreskado, kiel nature. Nature . . . ĝis la „ludema homo" iam komencas eluzi la kolorojn laŭ fantazio . . .

KVINDEK JARA ESTAS LA HUNGARA PERSA TAPIŜO ! En la tapiŝteksa kooperativo de urbo Békésszentandrás pli ol cent virinoj produktas la tapiŝon per manfaritaj maŝoj. En la jaro 1968 ili faris 500 milionojn da maŝoj ! Antaŭ kvindek jaroj alvenis tien el Transilvanio la hungara edzoparo, Johano Farkas kaj la edzino, kiuj komencis produkti kaj instrui la vilaĝanojn. En la jardekoj fariĝis la hungara persa tapiŝo jam mondfama ! Hodiaŭ ĝi estas konata kaj aĉetata en 50 landoj de la 5 kontinentoj. En la lasta jaro la kooperativo produktis tapiŝojn en valoro de 24 milionoj da forintoj. La kooperativanoj okaze de la jubileo aranĝas ekspozicion el la belegaj kaj valoraj persaj tapiŝoj produktitaj de ili.

Grandmezura restaŭrado komenciĝis en Veszprém: oni riparas la episkopan fortikaĵon kaj la antikvan katedralon (konstruita ĉ. j. 1000). Tiu ĉi episkopejo estas la plej malnova en Hungario, regnestro Géza fondis ĝin inter la jaroj 990—997.

LA HUNGARAJ VIRINOJ, kiuj naskas bebon, ricevas de la ŝtato helpmonon monate *dum tri jaroj* por ke ili povu zorgi hejme pri la bebo. La kondiĉo estas, ke la virino antaŭ la nasko laboru unu jaron en iu ŝtata entrepreno.

TREJNAS LA KNABO-TRUPANOJ DE FRADI — Ili estas 12—13-jaraj, kaj apartenas al la II-a aĝ-grupo de la knabotrupoj de Ferencváros Sport Klub (laŭ populara nomo: Sportklubo FRADI), kies nomo, pro la sukcesaj internaciaj matĉoj, estas konata en la mondo. La knaboj — certigas la esperplenan estonton . . .

(Foto: Karlo Hemző)

ANTAŬ CENT JAROJ (1868 decembro) naskiĝis la leĝo pri la popolinstruado en Hungario. Ĝi ordonis pri la deviga instruado, kaj lernejkonstruado en la urboj kaj vilaĝoj. Laŭ la leĝo la ŝtato havis rajton kaj devon kontroli la plenumadon ankaŭ en la alinaciaj lernejoj, kie la infanoj lernis en sia propra gepatra lingvo. Tiu leĝo estiĝis dek jarojn pli frue ol la sama leĝo de Anglio kaj Francio, tamen la plena plenumado de tiu leĝo ne estis en intereso de la sinjoroj de la tiama socio. Nur en 1919, la hungara Konsilantara Respubliko agadis en la spirito de tiu leĝo, sed bedaŭrinde la Respubliko vivis nur 133 tagojn . . . Sekvis la jaro 1945, la liberiĝo de la hungara popolo, kaj nur tiam estas plene efektivigita la unueca, ĝenerala popolinstruado en Hungario.

Nova hungara opero: Hamlet

Unu el la plej profundaj problemoj de la nuntempaj komponistoj estas bona kaj taŭga operoteksto. Ĉi tiu problemo turmentas la komponistojn jam de post la deveno de la muzika dramo — do de la opero.

Sed verki operon estas tre malfacile. La muzikamantoj tre ŝatas aŭdi, vidi kaj ĝui operojn, sed nur malofte pensas pri tio, ke komponi muzikon, daŭrantan almenaŭ du aŭ eĉ tri horojn, donas eksterordinare multe da laboro, penado.

Ni devas do alte taksi la klopodon de juna, apenaŭ 38 jara hungara komponisto, *Sándor Szokolay*, kiu entreprenis verki operon bazitan sur dramo de Shakespeare: Hamlet.

La nova opero estas jam la dua tiaspeca verko de la komponisto. Li finis antaŭ ses jaroj sian unuan operon sub la titolo *Sanga edziĝo* (laŭ teksto de Garcia Lorca), kaj la triumfo, kiun tiu ĉi verko atingis, pruvis, ke Szokolay estas unuaranga komponisto, kies nomon oni jam konas en multaj landoj.

Granda problemo estas solvenda, se la komponisto turnas sin al klasika teksto por verki laŭ ĝi operon. En ĉi tiu okazo la kontraŭdiro inter la literaturo kaj la muziko ricevas specialan akcenton, ĉar la drama karaktero havas tute alian sencon en la literaturo ol en la muziko.

La tragika karaktero de la dramo Hamlet baziĝas plejparte sur la konflikto de la eluzita, sed ankoraŭ vivanta tradicio kaj la racia moderna mondpercepto. En la ekestanta batalo venkas en la dramo la unua. Ĉu ĉi tiu venko estas definitiva, tion devas prijuĝi la vidanto, laŭ sia idea kaj senta mondo. Per aliaj vortoj: La tragika en la literatura dramo estas la konflikto inter la historie necesa postulo de la tempo kaj la praktike nerealigebla.

En la opero la tragika havas tute aliajn ecojn. La tragika en la literatura senco estas ĉi tie neebla. Pro tio la komponistoj de la ĝisnunaj Hamlet-operoj klopodis trovi solvon *muzikan* por la esprimo de la tragika. Tiu ĉi klopodo havis tre diversajn rezultojn, sed fina kaj definitiva solvo ankoraŭ mankas, eĉ en la nuna hungara opero, kiu tamen estas unu el la plej rimarkindaj verkoj laŭ la dramo Hamlet de Shakespeare.

Necesas rimarki, ke la juna komponisto, Sándor Szokolay tre atentis pri la teksto de sia nova opero: li elektis la majstran tradukon de la hungara klasika poeto János Arany, kaj li mem adaptis la tekston al sia verko. La belega traduko donas bonan bazon al la komponado, kaj la komponisto atentis ankaŭ pri tio, ke la valoroj de la teksto ne perdiĝu sub la muziko.

La muzika stilo de la nova opero eluzas la rezultojn de la plej novaj muzikstiloj de nia epoko. Tamen la aŭskultanto ne sentas la muzikon nekutima, ĉar la brula atmosfero de la opero kaptas lian atenton. La fonto de la atmosfero estas ĉiuokaze la unueco de la teksto, sceneja ludo kaj muziko; kaj ĉi tio estas unu el la ĉefaj trajtoj de ĉiu sukcesa opero.

El la fakto, ke en la nova opero la plej modernaj muzikaj esprimiloj estas uzataj, sekvas, ke la melodia mondo de la rolantaj personoj ne estas sufiĉe multflanka, individua; la moderna, ĉi-jarcenta muzika kulturo faris tre grandan paŝon antaŭen, sed la individua karaktero de la melodioj ankoraŭ ne povas esti esprimata per muziko plene kaj mature. El la nova opero tamen oni povas konstati, ke la tuta verko estas vere unueca.

La tuta opero estas tre konscia, kiel decas al komponisto kaj muzikamanto de nia epoko. Konvinke estas en ĉi tiu rilato, ke Sándor Szokolay bone kunfandis la muzikan materialon de la scenejo kun tiu de l'orkestro. Esceptoj estas nur la monologoj de Hamlet mem, kiuj eksonas kun akompano de la minimumo de muzikinstrumentoj: la orkestro neniam devas konkuri kun la peza persono de Hamlet.

Kelkaj interesaj karaktertrajtoj de la opero estas la jenaj: La parolo de la spirito en la unua akto estas akompanata de virina horo, kiu donas skuan eĥon al la koncerna sceno. — La etera karaktero de Ofelia estas prezentata per ĉiam bone rekonebla violonsolo — Memkompreneble, por fari la tekston taŭga je opero, la komponisto devis mallongigi ĝin; tiel forestas nun la rolo de Rosenkrantz kaj Guildenstern, ktp.

Kvankam la verkinto de la opero montris sin eminenta komponisto, ŝajnas, ke li ankoraŭ ne majstras ĉiurilate la modernan muzikteĥnikon, kiun li uzas en sia lasta verko; ĉi tio povas esti la plej grava kialo de la simileco de la melodioj kaj melodipartoj de la tuta opero. Sed ni povas esti konvinkitaj, ke Sándor Szokolay donos al la muzikamantoj eĉ pli altnivelajn grandmezurajn verkojn, ol la Hamlet-opero; ĉi tion pruvas la plej sukcesintaj partoj de la Hamlet-opero, precipe la belega kaj febre varmega finalo de la II-a akto.

Ĉe la prezentado de la opero Hamlet ne nur la teatra ludo, rolado kaj kantado de la personoj, sed ankaŭ ĉiu akcesoraĵo servas la novan verkon, kiu jam ĝis nun allogis la atenton de la Budapeŝta publiko kaj eĉ de kelkaj kompetentuloj el la eksterlando. Tiu ĉi fakto estas des pli rimarkinda, ĉar la muziko de l'opero tute ne similas al la melodia mondo de la plej ŝatataj kaj ofte prezentataj operoj.

Ni povas esti certaj, ke la sukceso daŭros en la naskiĝlando de la opero tute tiel, kiel en aliaj landoj, ĉar — kiel ni jam rimarkis — nova opero estas ĉiam grava evento en la kultura vivo. Opero, kiu havas tiom multe da valoroj, kiel la hungara opero Hamlet, certe havos gravan rolon en la kulturo de la tuta mondo.

Lajos Lesznai

Tria preĝo de Pygmalion

Verko de Sándor Szathmári

Aŭskultu mian humilan preĝon, ho, senmortaj dioj, ĉar mia koro jam tropleniĝis de doloro kaj nur via saĝeco povas porti al mi trankviliĝon!

Mian doloron ja bone scias vi, ho dioj, kiuj ĉion scias pli precize ol ni, mortemuloj. Mi ja ne diras miajn vortojn al vi por sciigi vin, sed nur tial, ĉar la ploro estas mildigilo de la doloroj. Kaj al kiuj aliuloj mi povus plori, se ne al vi, kiuj ĝis nun tiel abunde superŝutis min per viaj gracoj, kiel tre malmultajn homojn sur la tero! Vi faris min reĝo sur insulo Cyprus, eĉ dotis min per talento sur la tereno de la skulptarto kaj nun jam en multaj helenaj urboj, sur la plej belaj placoj kaj en la temploj staras miaj skulptaĵoj.

Dankon al vi!

Sed inter ĉiuj miaj skulptaĵoj, la plej bela estis tio, kion mi pretigis ĉi tie, en nia urbo por la templo de diino Aphrodite. Ĉi tiu estas tiom perfekta kreaĵo, ke mi pasigis tago-post tago mian tempon en la templo kaj terenĵetiĝe mi adoris — la marmoron!

Jes, mi konfesas: mi jam adoris ne diinon Aphrodite, sed la marmoron, kies frideco estis granda kontrasto al ties ĉarmeco: sian maldekstran manplaton ŝi tenas facile sur arbotrunko; la dekstran manon ŝi arkas super la kapo. Ŝia kisema buŝo, ŝia dolĉaspekta, serena vizaĝo, la du kumuletoj de ŝiaj mamoj kaj la freneziga konvekseco de la gluteoj min amoregigis. Sed kun pura animo mi povas deklari, ho senmortaj dioj, ke tio, kio min plej forte alkatenis, estis ne la perfekteco de la korpo, sed la animo, la diina, interna belo, kiu radiis de sur ŝia majeste bela vizaĝo.

Mi preĝis al vi, ho dioj, petegante, ke vivigu la marmoron kaj mi edzinigos ŝin al mi.

Mia peto dum longa tempo ne plenumiĝis. Vane mi prezentis al vi multekostajn sanktajn oferojn. Mi jam komencis suspekti, ke vi jam ne amas min, aŭ eĉ pli: ke dioj eble eĉ ne ekzistas.

Miajn krimajn pensojn mi poste multfoje pentis, ĉar via saĝo poste dokumentis al mi, kiom stulta kaj malaltkapabla estis mia menso kaj kiom saĝaj estis vi, dioj, kiam vi gardadis, ke la belo mirigu niajn korojn nur kaŝite en ŝtonon, sed ni ne deziru, ke la dioj viviĝu kiel teraj korpoj el la marmoro.

Nome, responde al miaj malperfektaj petegoj vi fine vere vivigis la ŝtonon. Foje, kiam mian varmegan frunton mi premegis al la piedestalo kaj denove mi preĝpetegis, subite mi sentis sur mia ŝultro ektuŝon de mola, varma, virina mano.

Mi suprenrigardis kaj mire mi vidis, ke la statuo viviĝis.

Mi kapturniĝis pro la feliĉo. Ŝi descendis de sur la piedestalo kaj genuiĝis antaŭ mi:

— La senmortaj dioj akceptis vian petegon, ho reĝo! — ŝi diris. — Mi viviĝis, por ke mi estus je via servo.

Milde mi levis, ĉirkaŭbrakis ŝin, kondukis ŝin al mia palaco kaj ordonis al la servistinoj ŝmiri ŝian korpon per multekostaj ŝmiraĵoj kaj vesti ŝin per la plej belaj vestaĵoj. La plej elegantajn ĉambrojn mi malfermigis al ŝi kaj ordonis servistojn por ŝia priservo. Memkompreneble mi edzinigis ŝin al mi.

Mi nomis ŝin *Aphrode*, por danki ankaŭ per ĉi tiu nomo la gracon de diino Aphrodite.

Dum kelka tempo nenio ĝenis nian feliĉon. En la lito ŝi estis arda amoranto, sed fiere mi ŝin enkondukis ankaŭ en mian societon, kie ĉiujn ravis ŝia beleco kaj saĝeco. Neniam mi imagis edzinon, pli indan al reĝo.

Sed post nelonge, aperis ŝiaj malkonvenaj karaktertrajtoj.

Se en ŝia ĉambro la pordoj, fenestroj estis fermitaj, ŝi plendis, ke mankas la aero. Mi malfermigis la fenestrojn, sed tiam la trablovo malutilis al ŝi.

Do, mi farigis tiaspecan ventoladon, ke la aero envenis varme, tra la plafono. Trablovo ne estiĝis.

Sed tiu solvo malpleje plaĉis al ŝi, ĉar ŝi deziris freskojn sur la plafonon.

Denove mi remasonigis la plafonon kaj pentrigis sur ĝin bildojn per niaj plej eminentaj artistoj. Sed eĉ la bildoj ne plaĉis al ŝi, ĉar tiuj montris la scenon, kiam Zeus per fulmoj mortbatas la titanojn. Ŝi postulis pli mildan scenon.

Mi transpentrigis la plafonon. Nun oni surpentris la naŭ muzojn, sed pri tio ŝi deklaris, ke ĝi estas enuiga, ĉar sur la bildo okazas nenio.

Nun mi jam petis ŝin, ke ŝi mem indiku, kion ŝi deziras. Ŝi responde ekploris kaj riproĉis min, dirante, ke mi estas al ŝi fremda, ĉar se mi harmonius al ŝia karaktero, tiam mi mem devus kompreni la dezirojn de ŝia subtila animo. Ŝi mem ne povas esprimi tiujn dezirojn, sed vera anima kunulo devus tiujn diveni.

— Ĉu mi pentrigu la dion *Hephaistos* en sia forĝejo? — mi demandis. — Aŭ la dion Pan, kiam li, per sia fajfilo muzikas al la nimfoj?

Ŝi ploregis kaj furioze skuis la kapon:

— Vi ne komprenas min, ĉar vi ne kapablas kompreni!

— Sed kion kompreni, koreto?

— Vi ne komprenas eĉ tion, ĉu kion vi devus kompreni!

— Sed diru vian deziron kaj mi plenumos!

— Se mi scius mian deziron, mi jam dirintus ĝin. Tial vi estas mia amanto, por ke vi mem diru mian deziron!

Tiatempe mi ankoraŭ kredis, ke mi mem estas stultulo, ĉar mi ne povas kompreni ŝian subtilan animon. Sed ĝuste tial mi estis stulta, ĉar tiatempe mi ankoraŭ kredis, ke tera mortemulo povas kompreni la animon de diino, kaj ĉar mi kredis, ke nur el mi mankas tiu ĉi kapablo.

Foje ŝi diris, ke ŝi sentas doloron en sia ventro. Mi vokis mian kuraciston, sed ŝi ne lasis sin priesplori, dirante, ke ŝi bone scias la kaŭzon: la dolorojn kaŭzas la ĉi tieaj vinoj, do, mi akiru al ŝi vinon el la insulo *Kios*.

Tiuvespere, en la lito ŝi forpuŝis min, dirante, ke la amo malutilas al ŝi antaŭ ol ŝi ricevos la Kiosan vinon.

Se mi volis ien iri kun ŝi, ŝi ne venis pro siaj doloroj. Sed, se ŝi mem volis iri ien, la doloroj ne malhelpis.

La Kiosan vinon ŝi ricevis, trinkis, kaj la rezulto estis, ke la doloroj transiris el la ventro al la brusto!

Sed finfine mia edzino devas esti mia edzino, do, mi postulis la amon. Responde ŝi tiom dolorplene palpadis la bruston, ke mi indulgis ŝin.

Tamen, tiu ĉi mia konduto jam delonge ne estis nura indulgo. Jam delonge mi kapablus ŝin ekbati se min ne retenus la scio, ke ŝin vivigis el marmoro vi mem, senmortaj dioj, do, mi ne volis veki vian malamon kontraŭ mi.

— Ŝi ne amas min — mi konstatis per kompleta konvinkiĝo. — Ŝi jam neniam fariĝos la mia, do, mi kondutos grandanime: ŝi vivu sian propran vivon. Se mi ne estas por ŝi sufiĉa, elektu amaton. Nepre ŝi pli bone scias la propran inklinon.

*

Kaj ŝi elektis iun — sandalfariston, kiu estis ne nur ne reĝo; ne nur nenion sciis pri la skulptarto, sed li estis ankaŭ mallaborema, pezmoviĝa, stulta homo, cetere tre mildanima, kiu neniam povis esperi, ke lia amatino foje estos viviĝinta diinostatuo. Sed al Aphrode ĝuste tio plaĉis, ke ŝi estis multe pli supera estaĵo, ol li. Ŝi verkis ampoemojn al li (ĉar ŝi estis poetino, eminenta, kiu verkis pli belajn poemojn ol *Sappho)* kaj en la lito ŝi ravite laŭtlegis la poemojn. Kaj li? Li jam ĉe la dua poemo endormiĝis.

Ne pasis tute du semajnoj kaj Aphrode elĵetis lin. Vi eble pensus, ke ŝi ekkonis, kiome netaŭga estis tiu homo, kiome nekonvena al ŝi. (Sed kion mi diras! Vi, dioj scias ĉion!) Ŝi elĵetis lin pro tio, ĉar li foje — ternis!

Poste sekvis la ceteraj viroj. Dum kelkaj semajnoj ŝi arde amis ĉiujn. Ŝi desegnis la momentan amaton sur vakstabulo, modlis lian figuron el argilo, ĉar ŝi eminentis en ĉiaspecaj artoj. Iun belan, fortikstaturan sian amaton ŝi skulptis kiel *Marsyas*-on kun kolombo sur lia etendita fingro.

Kion komunan havas la kolombo al Marsyas? Kial li ne tenis en la mano fajfilon de *Pan?* Eble vi scias, senmortaj dioj. Vi, kiuj eble scias eĉ la pensojn de ŝia koro. (Kvankam pri ĉi tio jam ankaŭ mi dubas.) Sed la kompatinda knabo devis longe, senmove stari kun ĉevalvosto, ligita al sia dorso kaj kun kolombo, ligita al sia fingro. Sed la kolombo ek-ektiradis la piedojn, ĝi ne staris senmove, do, ŝi eltordis la kolon de la kolombo, tra ĝia beko kaj kolo ŝi trapikis lignan stangeton, por ke ĝi staru fikse sur la fingro de la modelo.

Kiam la statuo pretiĝis, la kadavron de la kolombo ŝi enterigis sub la plankŝtonojn de la templo kaj tagopost-tago ŝi pilgrimis al ĝi por proplori la kolombon. La kompatindan modelon ŝi akre riproĉis pro tio, ĉar li lasis mortigi la kolombon. Ŝi eknaŭzis lin kaj forpelis. Nature, se li ne lasintus mortigi ĝin, ŝi jam pli frue forpelintus lin.

Inter ŝiaj amatoj troviĝis ankaŭ iu poeto. Tiun ŝi demandis, ĉu kiakolora robo konvenus al ŝi. Li diris bluan. Ŝi aĉetis ĝin, surmetis ĝin, sed ĝi ne plaĉis al ŝi kaj el tio ŝi konkludis, ke la poeto ne komprenas ŝian animon. Ŝi turmentis lin, ĝis fine la poeto teruriĝe forkuris.

Kiom da amatoj ŝi havis? Mi ne scias. Sed ĉiuj travivis la saman sorton: ŝia alflatiĝa ĉarmo ĉiujn ravis, kaj se ŝi jam alkatenis ilin, jam eĉ ekenuis. Per kapricoj ŝi ĉiujn turmentegis kaj fine forĵetis, aŭ ili mem fuĝis de ŝi.

*

Kaj fine ŝi revenis al mi!

Jes, ŝi revenis kaj petis, ke mi pardonu, ĉar ŝi konvinkiĝis, ke nur mi estas ŝia sola konvena vivkunulo.

Eĉ dum unu momento mi ne kredis, ke ŝi povis demeti sian naturon, sed mi tamen kredis, ke la trompiĝoj rompis ŝin kaj jam povas bremsi sian kaprican temperamenton.

Vere, ŝi bremsis dum du monatoj. Vespere ŝi sidiĝis apud mian liton kaj delektis min per liuta muziko, akompanante ĝin per sia dolĉa kantvoĉo. Ankaŭ la kantojn komponis ŝi mem. Poste, demetinte la liuton, enŝoviĝis en la liton kaj la lipojn ŝi premis al mia buŝo.

Mi kredis, ke mi alvenis al la plej perfekta feliĉo.

Post du monatoj okazis, ke foje ŝi petis, ke mi starigu la Marsyas-statuon en la templo.

— Marsyas estis mortemulo — mi respondis, — kiun la dio *Apollon* mortigis, ĝuste pro tio, ĉar Marsyas provis per sia muziko konkurenci kun la dioj. Ni eĉ provokos la koleron de la senmortaj dioj.

— Sed ni enterigu sub la statuon ankaŭ la modelon de la statuo, kiel sanktan oferon por senkolerigi la diojn.

— Ĉu li jam mortis?

— Ne. Mortigu lin por ke li fariĝu sankta ofero.

Min terurgis ĉi tiu krueleco kaj firme deklaris, ke mi ne mortigos lin. Vane ŝi argumentis, ke la kolombo havis la saman sorton, kaj ke ŝi priploros ĉiutage antaŭ la statuo.

Ekde tiam, ŝi fortiriĝis de mia kiso, pretekstante,

ke sur la insulo Cyprus estas epidemio. Se mi ektuŝis ŝin, forpuŝis mian manon, dirante, ke mia mano estas malvarma, aŭ, ke ŝia kapo doloras.

Ho, senmortaj dioj! Vi ja scias, kiom multe mi suferis!

*

Kaj jen, tiam mi fine komprenis vian saĝecon, ho dioj! Kiam mi petegis, ke la statuo viviĝu, vi dum longa tempo ne plenumis mian peton, ĉar vi bone sciis, ke diostatuo havas tiajn keraktertrajtojn, kiuj konvenas nur por dioj sur la monto *Olympos*, sed kiuj estas tute nekonvenaj al teraj mortemuloj kaj tiuj ecoj alportas al ni nur turmentojn.

Tiam mi, per mia stulta kapo ankoraŭ ne povis tion kompreni. Mi postuladis, eĉ akuzis vin, kaj vi, — fine plenumis mian peton, por ke mi per mia propra sperto konvinkiĝu pri tio, kion mia limigita menso ne povis percepti.

Tiatempe, kiam mi jam konvinkiĝis pri la vera situacio, tiam mi preĝis duafoje al vi, ke vi retransformu ŝin al marmoro. Kaj jen, tiun mian peton vi tuj plenumis. La statuo denove staras tie, en la templo, kaj mi ĉiutage vizitas ŝin por adori terenĵetiĝe ĝian Olympos-an belecon kaj la noblan animon, radiantan el ŝia vizaĝo.

Mi devas konfesi, ke mi denove adoras ŝin kaj amegas. Mi ĉirkaŭbrakas la marmoron kaj sentante la malvarmecon de la ŝtono, ofte mi pripentas mian duan preĝon. Min obsedas la tento kaj mi emus frapi mian kapon pro mia stulteco: kial mi redonis ŝin?

Sed ĉi tiu pento daŭras nur momenton. Se mi ekmemoras pri la terurajoj de ŝia vivo-tempo, tuj mi komprenas vian saĝecon, ho dioj: nun, ĉi tiel mi ĉirkaŭbrakas la serenecon, la ĉielan, la perfektecon, kiun ni, teranoj povas nur ĉi tiel senti. La perfekteco estas la trajto nure de la ĉielanoj kaj ni, teranoj neniam povos ĝin atingi. Ni sentas ĝin malpurajo kaj malvirto.

*

Ho dioj! Kiom saĝaj vi estas, ke vi tiel konatigis al mi la purecon, la senmankan, subtilan, absolutan belecon, kiu troviĝas nure en la ŝtono. En la ŝtono, kiu ne sentas, kiun infektas nenia malpurajo de la animo, kiu do ne turmentas nin.

Sed kial mi diras ĉi tiun mian trian preĝon?

Mi timas, ege timas, ke la beleco de la statuo denove ekbruligos en mi la sopirojn! Mi eble furiozos, pugnos mian kapon kaj preĝos, ke vi redonu ŝin al mi, ŝian karnan-sangan korpon kaj ŝian animon. Se tio vere okazus, ne aŭskultu min, ho dioj, ĉar el mi kriados nur la limigita, stulta homa koro. Alligu min al la masto, kiel la maristoj alligis *Odysseus*-on ĉe la insulo de la sirenoj kaj ne malligu min, kiel ajn kriados la doloro el mia koro! Ne malligu min!

Gardu min, ho dioj, gardu min! Multe mi suferis, eĉ nun mi suferas, sed ne permesu, ke mi ŝanĝu miajn suferojn al pli turmentaj!

Kaj savu nin, mortemulojn de la diinoj! Restu ili nur sur la monto Olympos. Vi ja povas elteni ilin!

Mihály Váci

LUNO KAJ STELO POLUSA

La Luno ŝvelas.
Sankta ĉiela meleagro.
Plenŝtopita parad-kuseno ama.

Ho, Luno!
Ŝvela mamo senkapa
de sankta bovin' Hindia
ĉe l'horizonto.

Ho, Luno!
ventrodikajo kosma,
kies adipotrema lumo
sin ostentas en la nokto.

Navigas tra l'infinito
noktpoto porcelana,
ĉion prilumas
la granda fortostreĉo.

Ĝin svene adoras turistoj
de ŝipoj ekskursaj,
ne scias, ke l'kapitano
gvatas la Stelon Polusan.

Sándor Csoóri

KE MALLUME NE ESTU

Videblaj ankoraŭ la pontoj aŭdacaj
betonborde, da arboj
senpersona vico,
vizaĝe de infanoj hejmenkurantaj
la posttagmeza neĝado.

Sed poiome fulgiĝas la akvo
kaj descendas ankaŭ la nokto de koro.
Pri la ekstermeblaj mi pensas,*
kiujn defendas sonĝo nenia.
Ensiblas al ili la silento kiel kuglo
kaj la soleco kiel famo funebra.

Pri la ekstermeblaj mi pensas,
plena de ili la tero.
Ne defendas ilin armeoj, rozolaŭboj, parfumaj ĉemizoj,
nek la arĝentaj bariloj de mono,
nek la amo.

Kaj vane ili mortas vane naskiĝantaj.
Pri la ekstermeblaj mi pensas.
Nur unu manon ili bezonus por havi patrujon,
nur unu korpon alian por ke mallume ne estu.

Trad: K. Kalocsay

Alude al la versoj de Attila József: „Neekstremeblajn ja tiel multege kiel nin, de post la apero de l'sunsistemo, oni ne ekstermis sur grandpasea tero, vizitis la hejmojn malsato, armilo, bigoteco kaj holero." (Vd. Hungara Vivo, 1965. N.ro.)

La plej eminenta hungara lingvisto, Bárczi-esperantisto

◀ *Honorigo en la Parlamento (dekstre: Géza Bárczi)*

LA HOMO

Foje mi demandis de li: kion li posedas? Li havas dek mil librojn kaj du puleojn.

Kiom riĉa kaj serena homo li estas, li ja havas dek mil librojn kaj du puleojn.

*

Mario Pei, profesoro de la Usona universitato Columbia, unu el la plej eminentaj lingvistoj de nia epoko, en sia verko: „Senregula lingvohistorio" citis italan proverbon: „Ĉiu birdo opinias bela sian neston."

Laŭ kalkulo de Pei la homaro disfalis al 2796 pecoj, la popoloj de la mondo ja parolas 2796 lingvojn.

Unu el la 2796 diversaj lingvoj estas la hungara. Per tio ni ankaŭ difinis la modestecon de la loko de la 75-jara Géza Bárczi en la mondo, kaj la grandecon de lia rolo sur la hungara lingvoteritorio. La Kossuth-premia akademiano Géza Bárczi, profesoro de hungara lingvoscienca katedro en la Scienca Universitato de Budapeŝto, nun fariĝis 75-jara. Li estas la plej eminenta vivanta scienculo de la hungara lingvo, de tiu ĉi lingvo kun ne granda disvastiĝo. Kvankam en la granda mondo ĝi havas malgrandan rolon — ja troviĝas 2796 lingvoj! —, sed en nia propra malgranda mondo ĝi havas grandan rolon, decas paroli pri tiu ĉi granda rolo.

„Ĉiu birdo opinias bela sian neston."

*

La viro havanta kaŝiĝeme severan vivon, estas videbla en la Akademio, en la universitato, en iu vagono de la suburba fervojo kaj en la strato Ráby Mátyás en Csillaghegy, kie li loĝas. Tiuj estas la limŝtonoj de liaj tagoj.

Lia apero, sinteno, maniero kaj tiu tuta atmosfero, kiu ĉirkaŭas lin, estas modesta. Nenio estas de li tiel fora, kiel la vantado.

Li estas videbla en pli-malpli eluzitaj, simplaj vestoj, en tre malnovaj manteloj. La eminenta scienculo — ŝajnas —, preferas la malluksan puritanecon.

Li ŝatas nenian ĉeflokon. Se li ĉeestas en la Akademio, demetinte sian mantelon, plej ofte staras flanke ĉe la muro, kaj li paroladas mallaŭte, kiel ĉiam.

Li fumas malbonajn cigaredojn. Plej ofte el cigaredingo.

Foje mi demandis de li: kie li alproprigis tiun dolĉan gepatran lingvon, kies plej eminenta scienculo estas li mem? Li menciis sian naskurbon Zombor, kaj sian patrinon, de kiu li heredis gepatran lingvon kun specifa, fluganta beleco. Lia patrino estis dialektlingva „paloca" virino, kiu transloĝiĝis el urbo Ipolyság en Zombor.

*

De post kvindek minus unu jaroj li loĝas en la Ráby Mátyás-strata domo en Csillaghegy. Tie ĉi li flegas, vartas, beligas la neston, kiun opinias ĉiu birdo bela. Ĝi ja estas la sia, la propra.

Ĉi tie li verkis sian libron, pro kiu li ricevis la Kossuth-premion: „*La fondo-dokumento de la abatejo Tihany kiel lingva memoraĵo*".

Ĉi tie li verkis la plej sorĉan-ravan hungaran lingvistikan libron, la romanon de la hungara lingvo „*La biografio de la hungara lingvo*" dum fluo de unu tuta jaro.

En tiu ĉi domo li laboras, ĝenerale inter tiaj leĝoj kaj ordo, ke por unu prelego, kies prezento daŭras dudek kvin minutojn, li uzas dudek kvin labortagojn.

En la triĉambra loĝejo la vidva scienculo ne havas multe da spaco. Lin sieĝas la libroj de jaroj kaj jardekoj, etendiĝas dise kiel tenacaj volvobranĉoj. Jam kapitulaciis la verando, du ĉambroj, ili jam eksieĝas la kuirejon, kaj ili komencas elpremi el la hejmo tiun viron, kiu laboras ne per sia dudekkvin-jara olda skribmaŝino, sed ĝenerale per krajono, kaj ankaŭ skribotablon li ne posedas, ĉar ununura tablo estus malmulta al la laborado, al la fontonotoj, libroj kaj memorigiloj. Pro tio li formas bastionon ĉirkaŭ si el pluraj tabletoj, li metas siajn librojn kaj notojn sur tiujn, kaj li laboras en tia ekscita stato, ke venenojn li tute ne bezonas, nek kafon, kofeinon. La horojn kun tia interna hejto, la kvietajn kaj varmajn minutojn de la laboro perturbas neniu, nur la hundoj, alvenantaj de tempo al tempo furioze.

Géza Bárczi estas riĉa-serena homo: li posedas dek mil librojn kaj du puleojn. La hundoj „Pajkos" kaj „Betyár" frapegas foje-foje tiujn tablojn, sur kiuj kuŝas tiuj notoj, kiuj ebligis inter aliaj la verkadon de la romano de la hungara lingvo.

Péter RUFFY

Trad.: KÖKÉNY

LA SCIENCULO

El la antaŭparolo de la libro "La bibliografio de la hungara lingvo"

Inter la grandiozaj kreaĵoj de la homa spirito apenaŭ troviĝas ankoraŭ unu, kiu en fundamenta graveco povus konkuri kun la lingvo. Jes, la lingvo, ĉi tiu ĉiutaga uzinstrumento de interŝanĝo de niaj pensoj kaj sentoj, estas unu el la plej gravaj faktoroj, eĉ kondiĉo de ĉiuspeca homa evoluado. Al ĝi estas ŝuldeble plejmulte, ke la spertoj de la generacioj sekvantaj unu la alian povas akumuliĝi, kaj povas herediĝi al la posteuloj; ke la batalon kontraŭ la indiferentaj aŭ eĉ malamikaj fortoj de la naturo ne devas ĉiu nova generacio komenci de antaŭe, eĉ ĉiu unuopa homo ne devas batali por tio aparte, izolite. Socion homan, eĉ en primitiva grado, oni ne povas imagi sen ia lingvo.

Estas sendube, ke la artikita, fleksiĝema homa lingvo estas la plej grandioza kreaĵo de la homaro, kiun kreis en siaj holdiaŭaj fazoj la konstanta fortostreĉo de la senfinaj vicoj de la generacioj; ĝi estas tia instrumento, kiun ni povas neniam malhavi, kiu akompanas kaj servas la homon dum lia tuta vivo, de tiu tempo, kiam li en sia junaĝo ekkonscias. Kaj „la lingvo" estas por ĉiuj unuavice la gepatra lingvo. Fremdan lingvon oni povas ellerni, eĉ en escepta kazo oni povas ĝin scii ankaŭ tre bone, sed preskaŭ neniam tiel, kiel la gepatran lingvon, kies ĉiun eron miloj da memoraĵoj kolorigas kaj plenigas per enhavo, kiu akompanas nian tutan plenkreskadon, evoluadon, eĉ ĝis certa grado decidas ankaŭ la formojn de nia pensado.

La lingvo estas historia produktaĵo, kaj oni povas vere koni kaj kompreni ĝiajn komplikajn sekretojn nur, se ni konatiĝas kun la procedo de ĝia longa, longega evoluado kaj formado. Sen lingvohistoria fono ne ekzistas vera, pli profunda, konscia lingvokono, ja la pensanta homo ne kontentiĝas pri instinktaj, sed nur pri konsciaj konoj.

Tiu ĉi verko en sia speco estas la unua provado, por resumado de la tuta hungara lingvohistorio, provado limiĝanta nur al la ĉefaj trajtoj, kiu parolas ne al lafakuloj, tamen parolas kun plena scienca respondeco.

Géza BÁRCZI

Trad: L. KÖKÉNY

LA ESPERANTISTO

Bone mi memoras, kiel grandan ĝojon havis mi, juna esperantisto, ĝui en nia tiutempa altnivela revuo „La Verda Standardo" sinsekve scenojn el „La Tragedio de l'Homo" en traduko de mia samaĝulo Géza Bárczi. Li tiam en la unua duonjaro de 1914 estis la redaktoro de la gazeto, kaj verkinte multajn edifajn artikolojn Esperante esprimis: *„Lingvo ne havante literaturon ne povas vivi. Ĉar literaturo estas ĉiam trezoraro de la lingvo, eĉ pli, ol trezoraro; ĝis certa grado ĝi estas vivkondiĉo por ĝi. La mirindan spiritan evolu-on de nia lingvo ni povas danki nur al ĝia literaturo, kiun komencis la Majstro mem tre bone kompreninte, ke sen literaturo la lingvo restus pupo malviva, ke por la lingvo literaturo estas kvazaŭ aero por la homo."* Jam tiam li plendis, ke la esperantista popolo grandparte ne legas, ne konas sian literaturon, kaj instigis ke oni fondu grupajn bibliotekojn por subteni la literaturon, por veki la intereson, por eduki la membrojn al legado. Géza Bárczi mem dum sia kelkjara tiutempa kunlaboro verkis literature: jam en 1911 aperis traduko de turka poemo, fabelo, poemoj de Petőfi kaj Vörösmarty, prozaj tradukoj, recenzoj, turkaj proverboj, kaj en 1913–14 la menciita „Tragedio".

Géza Bárczi naskiĝis en 1894 en urbo Zombor, (nun en Jugoslavio), en oficista familio. Li konatiĝis kun Esperanto kiel dekkvarjara gimnaziano. Li mem rakontis, ke tiu ĉi estis la unua femda lingvo, kiun li sukcese lernis, kaj al kiu li dankas, ke li ricevis instigon lerni aliajn lingvojn. „Nur la lerno de la unua fremda lingvo kaŭzas malfacilaĵojn, la pluaj lingvoj jam lerniĝas pli facile, precipe se tiu unua lingvo estis Esperanto."

Bárczi finis la universitatan studon, fariĝis en Budapeŝto mezlerneja profesoro, poste universitata en Debrecen kaj de 1952 en Budapeŝto. Pro siaj lingvistikaj laboroj li fariĝis membro de la Hungara Scienca Akademio kaj ricevis la Kossuth-premion fariĝinte plej eminenta laŭreato.

Li estis la rektoro de la Somera Universitato de la Kongreso en 1966 en Budapeŝto, fariĝis membro de la prezidantaro de nia landa Asocio, kaj verkis valorajn artikolojn hungare, pledante por Esperanto. Géza Bárczi estas rajte nia fiereco.

Paŭlo BALKÁNYI

HUNGARA VIVO

Aperas jare 4 × 4 000 ekzempleroj
spegulmezuro: 172 × 240 mm 3 kolumnoj 54 mm

Oficiala revuo de la hungara Esperanto-movado. Ĝi enhavas beletristikon, novelojn, poemojn, ktp. — artikolojn pri problemoj de la hungara Esperanto-movado kaj skribaĵojn prezentantajn la vivon de Hungara Popolrespubliko kaj de la hungara popolo.

1/1 paĝo $ 120,— DM. 480,—

HUNGEXPO (reklam-agentajo) Budapest 70 POB. 44

VOJO AL NOVAJ MEDIKAMENTOJ

Hungarion vizitantaj samideanoj ofte mencias, ke hejme ili uzis medikamentojn produktitajn en Hungario. Ne mirinde: 80 landoj aĉetas grandkvante kaj regule niajn medikamentojn, inter ili Aŭstrio, Belgio, Francio, Kanado, Germana Fed. Resp., Svedio, Sovetunio, Svisio, k. a. Eble surprizas, ke 3/4 parto de la tuta produkto estas eksterlanden liverata. El la interesega historio de la hungaraj medicinaĵoj ni konigas sube kelkajn ĉapitrojn, por klarigi iom la suprajn faktojn.

Unu el la ĉefaj rimedoj de la sanigado estas la medikamento. La diversaj substancoj devas prezenti siajn sanigajn efikojn por bono de la homo. Ĉi tiu pretendo, igi helpema la naturon mem, devenas jam el la pratempo. Sed kiel plenumiĝas tio hodiaŭ? Kiel kreiĝas la modernaj, fortefikaj medicinaĵoj?

Homo de tiu arto, univ. prof. d-ro Otto Clauder volonte klarigas al ni tion, dum interparolo en lia instituto en Budapeŝto. Longjara scienca esplorado, gvidpostenoj en fabriko de medikamentoj markas lian vivovojon. Li malkovras nekonatajn fenomenojn, novajn medikamentojn, krome instruas la novan aron de medikamentoesploristoj en la Instituto pri Organika Kemio de la Medicina Universitato, unu el la pluraj hungaraj institutoj esplorantaj medicinaĵojn.

Vi devas scii — emfazas prof. Clauder — ke la efikeco de medikamentoj devenas unuavice el iliaj kemiaj ecoj. Nia kemia instituto devas tial profunde analizi la strukturojn, efikojn, apartaĵojn de organikaj kombinaĵoj. Surbaze de tiu studado niaj *kemiistoj* ekstraktas aŭ elformas por difinitaj sanigaj celoj medicinaĵojn. En institutoj de *biokemiistoj* tiuj estas vaste ekzamenataj sur laboratoriaj preparitaĵoj, ekzemple sur hepato-pistaĵo, kaj la observitaj efikoj en la ĉeloj jam klare determinas iliajn sanigeblecojn. Tiam prenas ilin *farmakologoj* por detale observi ĉiujn iliajn bonajn, malbonajn efikojn sur izolitaj vivantaj organoj, kiel hepato, nervofadeno eĉ sur vivaj bestoj. Estas interesega la metodo, fari observebla la kuracilon per radioaktiva izotopo, ĉar tiel eblas per indikilo de radioaktiveco (Geiger — Müller) konstati sur la besta korpo, kie koncentriĝis interne la kemiaĵo. Tiujn organojn oni eltranĉas por la kemiistoj, kaj ni denove ekstraktas el ĝi la kuracilon por ekzameni, kian interrilaton havas eroj de la kemia strukturo kun la modifiĝoj en la vivaj ĉeloj, ĉu estas bezonata la modifo en la molekulo-strukturo. Nur post ĉiaflanka korektado ricevas ĝin klinikoj de la universitato, kie *fiziologoj*, kuracistaj esplorantoj, zorgeme observante reagojn de la homa organismo, kreas la konvenan kuracmetodon per tiu medikamento.

Dum ĉiuj etapoj aperas novaj karakterizaĵoj, kaj oni devas multfoje reveni al fruaj etapoj por eligi nedeziratajn efikojn. Ĉio ĉi bezonas tutan „teamon", striktan kooperadon de diversfakaj esploristoj, ne forgesante eĉ teknikistojn de tiu fabriko, kiu pleje taŭgas por produkti ĝin. (La ses grandaj hungaraj fabrikoj de medikamentoj apartenas ĉiuj al la ŝtato). Finfine post longa eksperimentado la nova ilo ricevas la oficialan licencon eniri en la kuracistan praktikon. Granda scienca aparato, produktanta ofte gravajn inventojn, tutmondajn patentojn estas ja bezonata — diras profesoro Clauder —, ĉar la kuraciloj estas rapide flankenŝovataj de pli novaj; nuntempe jam nur 5—10 jarojn daŭras ilia uzado. Eĉ pro akomodiĝo de la organismo, kaj de la bakterioj oni devas ŝanĝi la kemiaĵojn.

La profesoro rememoras pri komplikaj analizadoj, surprizoj dum observadoj, pri sukcesoj. Kontraŭ *koraritmio* (malegaleco de pulsado) delonge uziĝis kunalkaloido de kinino, la *kinidino*. Antaŭ nelonge oni malkovris, ke alia alkaloido, la *ajmalino* efikas tute same. Prof. Clauder opiniis ian samecon en ilia kemia strukturo: ekzamenis ilin, kaj vere, trovis *saman ringo-sistemon* en ambaŭ molekuloj. Fiziologoj pruvis, ke de tio devenas la kurac-efiko. Do, estis serĉataj kuracherboj kun la sama ringo-sistemo en la molekuloj por trovi novan medicinaĵon kontraŭ la kor-aritmio, tamen nehavantan la malagrablajn kromefikojn de kinidino.

Konata estas la kuracherbo digitalo, bonefika por koro. En ties hungarlanda speco *(Digitalis lanata)* prof. *Tuzson* rimarkis *glikozidon* multe pli efikan ol en la ceteraj. La fabriko Richter en Budapeŝto dum la postmilitaj jaroj sukcesis per fabrikadprocedo ekstrakti tiun efikegan substancon, kaj nun sub nomo *Izolanid* amase eksportas ĝin.

Akiris veran furoron la hungara sciencisto *Békéssy*, kiam li inventis la produktmanieron de *la ergoto*, por la medicino, tre bezonata *fungo*. Per spritmetoda infektado li sukcesis kulturi grandkvante tiun fungon parazitan kaj ekstrakti ĝian gravegan kuracalkaloidon. De tiam la ampleksa produktado de ergoto en Hungarujo ebligas tutmondan eksporton de la sangadon (hemoragion) malhelpantaj *Ergotamin*, kaj *Ergotoxin*. Per ties modifo prepariĝas grava efikilo por la *Beloid*-tablojdoj, uzataj kontraŭ hemikranio (migrain). Estas interese, ke el la produktita alkaloido oni preparas la faman drogon LSD, kiu kaŭzas tre strangajn psikozojn ĉe bestoj, studatajn por pli bone koni mensajn malsanojn.

Bestkuracisto observis antaŭ 40 jaroj, ke la perdita sango estas reakirebla manĝigante tre multon da hepato. De tiam oni produktis tiucele multspecajn hepato-ekstraktojn, ĝis finfine oni malkovris la vitaminon B_{12}, sanigantan la *anemion* per nura 20 milonoj de gramo! Multajn penojn konsumis al ni tiu esplorado — ridetas prof. Clauder, — sed pli interesa ŝajnas al nefakuloj la surpriza fakto, ke la fulmrapida resaniĝo estas atribuenda al speciala komponaĵo de *ciano*, krom la malofta elemento: kobalto. En la mondo nur kelkaj plej grandaj fabrikoj produktas la vitaminon B_{12}. La hungara fabrikmetodo grave diferencas de la eksterlandaj metodoj, ĉar ĝi tute forigis la hepato-amasojn, eĉ la kirladon de diversaj substancoj. La hungaroj konstatis, ke la facile akireblaj *metan-bakterioj* produktas B_{12} vitaminon! Nun prizorgante ilian kulturadon oni ricevas — simile al la penicilioj — en formo de brilaj, ruĝaj kristaloj grandegan kvanton da puraj vitaminoj, dissendatan al la tuta mondo.

Jam delonge estas temo de la hungara esploro ankaŭ la *hormonoj*, tiuj pli kaj pli bezonata sanigiloj. Ekzistas eĉ reŭmatismoj kies perfekta kuracilo estas hormonaĵo, grandkvante fabrikata en Hungario, nome „*Depersolon*" (pli efika ido de „Hydrocortison"). La hungara kemia industrio atingis jam grandajn sukcesojn per hormonaĵoj. Ni aludas inter aliaj al la multloke savitaj mizeruloj, kies marasman organismon fortikigis, grasigis la hormonaĵo „*Nerobol*". Tamen ĝian mirindan efikon je la homa metabolo sekvis nenia hormonperturbo koncerne la seksecon de la malsanuloj — finis la interparoladon profesoro Clauder.

Ervin Fenyvesi

Budapesti IDEGENFORGALMI IGAZGATÓSÁG

BUDAPEŜTO ATENDAS VIN!

Pri Via loĝigo tagnokte zorgas la dommastro de la ĉefurbo, la

BUDAPEŜTA FREMDULTRAFIKA DIREKCIO

Gastoĉambroj ĉe privatuloj, turisthotelo, higiene ekipitaj lignodometoj en kampadejoj, urborigardaj rondvojaĝoj, vizito al la Parlamentejo kaj al la Fortikaĵ-placo en Buda.

Biletoj por teatroj, koncertoj, sportaranĝoj, vendado de donacaĵoj kaj memoraĵoj, informado.

Ĉefkontoro: ĉe la Ĉenponto: V., Roosevelt tér (placo) 5. Tel.: 380-581, 180-609. — Malfermita: 8a-23a horoj.

Filio: proksime de la stacidomo Nyugati: VI., Bajcsy-Zsilinszky út (bulvardo) 55. Tel.: 314-545. — Malfermita: tagnokte

Róbert Berény: Kaptu armilon! Kaptu armilon!

AFIŜARTO DE 1919

La sociaj revolucioj estis — precipe en la du lastaj jarcentoj — grandaj inspirantoj rilate al artoj. La renoviĝo de la literaturo, pentro- kaj skulptartoj, same de muzikarto komenciĝas jam en la unuaj jardekoj de la maturiĝantaj sociaj revolucioj. Ankaŭ ili mem estas preparantoj de la revolucioj pere de siaj entreprenemaj vojserĉadoj, kuraĝaj vivo-elvokoj. Kiam alvenas la granda momento, longe atendita de milionoj, ankaŭ la artoj estas inter la popolamasoj, por kuraĝigi la samsortanojn, por helpi la individuan kaj kolektivan prosperojn.

Kio en Hungario okazis antaŭ kvindek jaroj, tio estis nur parteto de la granda socia revolucio, kiu trabalais Eŭropon post la kvarjara, sanga unua mondmilito. La Konsilantara Respubliko vivis nur apenaŭ 133 tagojn, tamen la hungaraj artistoj, unuavice niaj pentristoj, grafikistoj kreis daŭraĵojn. Dum la kvar monatoj ĉirkaŭ cent afiŝoj aperis sur la stratoj en Budapeŝto, kaj en grandaj urboj, multaj el ili atingis ankaŭ la vilaĝojn, por ke ili apogu per siaj efikoj kaj ankaŭ nemiskompreneblaj direndoj la batalantan landon, la popolon luktantan por siaj sociaj rajtoj. Emocian sincerecon, imponan forton, junecan dinamismon montras la desegnaĵoj de ĉi tiuj afiŝoj, kaj altnivelan, artan certecon, nediskuteblan talenton. Tiu fakto estas nesurpriza, ja la plej eminentaj hungaraj artistoj kreis ĉi tiujn, ĝis hodiaŭ famajn, al niaj belartoj ankaŭ nuntempe

efikajn artaĵojn. Post la malvenko de la revolucio multaj artistoj devis elmigri, tamen ilian nomon, kaj la plej elstarajn verkojn ekkonis kaj rekonis tuta Eŭropo.

La kolora afiŝo de Bertalan Pór (1880—1964) kun titolo: ,,Por viaj edzinoj, infanoj, antaŭen!'' (182×250 cm granda), ĝuste ĝia foto beligas la nunan kovrilpaĝon de Hungara Vivo. Pór lernis en Budapeŝto, Munkeno kaj Parizo, post patrolandaj ekspozicioj de siaj kreaĵoj, li partoprenis ankaŭ la ekspozicion en San Francisko en la jaro 1915. Post la malvenko de la revolucio, li elmigris Ĉeĥoslovakion, estis en Vieno, Berlino, fine li ekloĝis en Parizo. Li hejmenvenis en la jaro 1948, rericevis sian katedron en la Belarta Ĉeflernejo. Pro siaj kreaĵoj la ministraro dufoje honorigis lin per la Kossuth-premio.

Afiŝo de Róbert Berény (1887—1953) kun titolo ,,Kaptu armilon! Kaptu armilon!'', kun la figuro de ŝipano, alvokanta por batalo, svingante la ruĝan flagon, estiĝis simbolo de la Konsilantara Respubliko. Eble ankaŭ ĉi tiu malgranda, nur blanka-nigra foto kapablas konjektigi, kian agitan efikon ĝi havis en tiu epoko. Kiu nun nur unuafoje vidas ĝin, kaj iom konas la grandnivelan politikan afiŝarton de post la franca Daumier, tiu konsentas kun ni, se ni metas ĉi tiun verkon de Berény en la vicon de la plej bonaj.

Afiŝo de Béla Uitz (1887—) kun titolo ,,Ruĝsoldatoj, antaŭen!'' prezentas ankaŭ la formrenoviĝon de la hungara belarto. Lia emo por eksperimento kaj novigo jam en la unuaj jaroj de lia studado montriĝis. La unuan ekspozicion li aranĝis en 1913, sed lian akvaforton jam en la jaro 1916 en San Francisko oni premiis per ormedalo. Post la malvenko ankaŭ devis elmigri, li vivis en Vieno, Londono, Parizo, fine il ekloĝis en Sovetunio. Liaj faraĵoj levis la eĉ en la nunaj tagoj laborantan majstron al la vico de la grandaj artistoj de la 20-a jarcenta belarto.

Mihály Gergely

Béla Uitz: Ruĝsoldatoj, antaŭen!

György Moldova

LA TURNEBLA SOLDATO

Ofte okazas tiaĵoj, karaj sinjoroj, ke en la cerbo de la homo ĉesas moviĝi eĉ tiu malmulta akvo, kiu en ĝi estas — komencis Henriko —, sed en mia vivo ankoraŭ mi ne vidis tian strangaĵon, kia estis la turnebla soldato.

En la dua mondmilito mi militservis ĉe la pioniroj, nian taĉmenton oni subordonis al germana majoro, al Von Luge. Anstataŭ defendi la sekurecon de la propraj soldatoj, ni devis plenumi liajn ordonojn, kaj kiajn ordonojn!

Foje ni batalis en la zono de la U krajna urbo Platovo. Post longa marŝado, nokte ni venis al la urbo, ni ĝojis, ke fine ni povas ekkuŝi. Sed apenaŭ ni dormis dek minutojn, kiam la ordonportisto de Von Luge nin vekis:

— „Schnell arbeiten", do ke ni iru tuj labori. Pene ni restariĝis, la ordonportisto kondukis nin al la stacidomo, ni devis ellevi gandegan keston el ŝarĝvagono, sed tiel grandan, ke ni devis disfrapi la flankon de la vagono, ke ĝi povu trapasi, kaj eĉ tridekope ni ĝemis sub ĝi. Poste ni deprenis keston pli malgrandan.

Ni transportis la kestojn sur la ĉefplacon de Platovo kaj malfermis ilin. En la pli granda troviĝis granda statuo, ĝi figuris germanan soldaton, ĝi estis nek bela, nek malbela, ni jam rigardis ĝin dek minutojn, kiam ni rimarkis, ke mankas al ĝi la dekstra brako. Nu, kiel tio estas ebla. Fine ni ĝin trovis en la pli malgranda kesto, ni muntis ĝin sur la korpon, tiam malkaŝiĝis, ke tiu ĉi brako kuraĝe montras antaŭen. La majoro starigis per ni la statuon tiel, ke la dekstra brake montru al oriento, al la koro de Ruslando, ke ĝi montru la vojon de la germana venko. Kompreneble poste ni pluiris kaj la statuo restis tie, sur la ĉefplaco.

Nemulte pli poste Tolbuĥin frapis sur nian bekon, proksimume cent kilometrojn ni devis retiriĝi, ni fordonis ankaŭ Platovon, en la ĉirkaŭajo de la urbo oni reorganizis nin. La komando decidis, ke Platovon ĉiamaniere ni devas reokupi. Oni koncentris la restintajn fortojn, kaj ankaŭ sukcesis la trarompo, la sekvan tagon ni jam paŝadis en la urbo. Elfalintaj arboj, ruinaĵoj, multegaj ruiniĝitaj domoj; nur pro scivolemo mi iris al la ĉefplaco. — Nu — mi pensis en mi — mi rigardus, kio okazis al la statuo? — La statuo de la soldato staris tie sur sia loko, sed konsterniĝinte mi vidis, ke la rusoj ĝin elfosis kaj turnis kun vizaĝo al la kontraŭa direkto, tiel, ke ĝia dekstra brako ne montris al oriento, sed al okcidento, anoncante, ke prefere al tiu direkto iru la bronza soldato, sur kies postaĵo, cetere, vidiĝis ankaŭ kota spuro de boto.

Tion rimarkis ankaŭ Von Luge. Li elfosigis per ni la statuon kaj ĝin returnigis; nur tiam li trankviliĝis, kiam li vidis, ke la dekstra brako denove montras al oriento.

Vi ne kredos tion, karaj sinjoroj, sed Platovo naŭfoje ŝanĝis mastron, kvarfoje ĝi estis en niaj manoj, kvinfoje en tiuj de la rusoj, sed eĉ tempe de la plej grandaj bataloj ambaŭ havis tempon por tio, ke la statuon ili turnu al oriento, respektive al okcidento. Eĉ pli: ĉe iu sia retiriĝo, moke aŭ minace la rusoj metis la statuon sur oldan akson, anoncante per tio, ke baldaŭ ili revenos al Platovo kaj denove ĝin turnos.

Lastfoje tiam mi vidis la turneblan soldaton, kiam kiel militkaptiton la rusoj min portis tra la urbo, jam eĉ unu neruinigita domo ne restis en Platovo, sed la statuo sendifekte staris sur sia loko, nur ĝian dekstran manon tordis ia terura aerpremo, tiel, ke nun ĝi montris supren, kvazaŭ ĝi direktus anstataŭ al Sanktpeterburgo al Sankta Petro la germanojn.

Tradukis: L. Tárkony

GASTA PAĜO

HILDA DRESEN

POR KIU KUKUAS KUKULO!

Kiam bonhumore
kukuadas kukolo,
tiam bonodore
floras flava primolo,

tiam grandamase
en arbar-regionoj
helas blankoaze
sur la ter' anemonoj,

kaj la koridalo
delikate gracia
ŝajnas rev', ne realo
en kaŝej' idilia.

Por la anemono,
koridal' kaj primolo
dum printempa sezono
kukuadas kukolo.

En la eldono de *J. Régulo, La Laguna*, kiel tridektria volumo de la serio „*Stafeto, Beletraj Kajeroj*" sub la titolo „Norda naturo" aperis la poemlibro de *Hilda Dresen*, la estona esperantista poetino. Kiel tradukistino ŝi multon aldonis al la internacia konatigo de la estona poezio, sed ŝi tradukis ankaŭ el la rusa, germana kaj aliaj lingvoj. Sed apud la tradukistino almenaŭ same oni devas pritaksi la originalan poetinon. Jen kiel skribas *K. Kalocsay* pri tio:

„Ŝi rigardas sin pli tradukinto ol originala poeto Ŝi ne estas prava. Ŝiaj tradukoj ja estas belegaj, sed laŭ mia sento ŝia talento montriĝas plej libere ĝuste en ŝiaj propraj poemoj". Kaj jen citaĵo el la Prologo de *L. Tárkony:* „Nun, en la poezia mondo de la rafinita senco-kaŝo kaj majstre pimpigita sentezeco kaj sensintenseco, necesas certa kuraĝo kanti tiel senpere kaj senimplike. Sed se oni liberigas sin de tiuj tempokatenoj, iom post iom oni tamen venas sub la efikon de ĉi tiuj poemoj, kantataj kun la varma melodieco de virina voĉo. En tiuj poemoj montras sin animo, kiu malfacile malfermiĝas al la homoj, sed kune spiras kun la naturo, kune vivas kun la arboj kaj floroj: ĝi montras sin kvazaŭ nevole, kvazaŭ por ree kašiĝi. Tiu hontema kašiĝado, trarompata de momentoj de konfesemo, faras ĉi tiun tiel simplan poezion tamen ne nur alloga, sed ankaŭ ekscita."

Nun, karaj legantoj, akceptu kelkajn frandaĵojn el tiu ĉi leginda libro.

*

MI NENION SCIAS

Mi nenion scias,
eble fantazias
kvazaŭ en nebul',

kaj al mi mensogas
tio, kio logas
kiel sonĝa lul'.

Mi nenion scias,
sed min emocias
ia stranga brul'.

Eble vanas ĉio,
estas nur fikcio,
sapvezika nul'.

Mi nenion scias,
tamen erupcias
larmoj el okul'.

ANEMONOJ

Anemonoj, blankaj fruprintempaj floroj,
kiam mi vin vidas, karaj rememoroj
pri la infanec', de fore tiel brila,
ŝvebas al mi dolĉe kun kares' flugila.

Kiam freŝodoron vian mi enspiras,
kiu al printempa humodor' similas,
io forgesita, kara, kvazaŭ fea
ŝajnas revekiĝi por vivado rea.

Ree kun naivo scias mi deziri
sorĉajn neeblaĵojn, pri nenio miri,
ĉion kredi kiel en la frua aĝo,
kiel post libelo kuri post miraĝo.

VOLIS VI...

Volis vi, ke mi ne larmu,
larmoverše plu ne tristu,
ke mi kontraŭ plor' min armu,
al la malesper' rezistu,

ke rideti mi jam lernu
fidoplene, facilkore,
por malĝoj' la koron fermu
ŝultroleve kaj ignore.

Se nun seninvite venos
la momentoj senkonsolaj,
mi por vi rideti penos
eĉ tra larmoj kontraŭvolaj.

KION DIRI, KIEL MIRI...

Kion diri, kiel miri!
Ĉe vojfino sur ruino
forlasite, homevite
en rubaĵo kreskis flor'.

La burĝonoj inter ŝtonoj,
jam kun revo pri diskrevo
ĝojsalutas, ja surŝutas
ilin sun' per sia or'.

En rubaĵo kun kuraĝo
floro floros, vivon gloros,
bluos, bluos kaj instruos
ion al la homa kor'.

MI SIRINGOFLOROJN HAVIS...

Mi siringoflorojn havis
multajn en ĉi tiu jar';
la siringofloroj savis
iun el la viv-amar'.

La siringofloroj flustris
kun tenera kor-dorlot'
al animo, kie rustis
sentoj pro la vivokot'.

Mi siringoflorojn havis
ĉi-printempe en abund',
ies koron ili ravis,
cikatriĝis ĝia vund'.

FAMAJ HUNGAROJ EN LA MONDO

Albert Szent-Györgyi naskiĝis en la jaro 1893. Al lia nomo ligiĝas la vitamino C, preparita el kapsiko. Liaj gravaj eltrovoj pri la ĉelospirado kaj muskolbiokemio jam en lia juna aĝo alportis al li famon. En 1937 li ricevis la premion Nobel. Ekde la jaro 1949 li laboras en Usono. Li estas renoma membro de grupo de humanistaj scienculoj, batalantaj por la paco.

Albert Szent-Györgyi:

MIAJ MALFACILAĴOJ KUN LA ATOMO

(Parto el la parolo de la aŭtoro al la loĝantoj de Falmouth, dirita en januaro 1962)

La plej grava demando de nia epoko estas la ATOMO.

Ĝi starigas nin ĉiujn antaŭ alternativon: aŭ neniam imagita bonstato kaj digno, aŭ mizero kaj pereo.

Mi estas plena de malfacilaĵoj. Mi ne estas atomscienculo, sed biologo. Dum la kvardek kvin jaroj de mia esplorlaboro multe mi okupiĝis pri la energio, kaj mia baza tezo estis tio, ke inter energio kaj energio ne estas diferenco . . . Sed mi aŭdas de la atomscienculoj, ke la atoma energio diferencas de ĉiu alia formo de energio, kaj kiam la homo malkovris tion, li alterigis unu el la kosmaj fortoj, ekzistantaj en la universo. Kompare al ili, la ekzisto de la homoj sur la tero, aŭ, eĉ la tuta sunsistemo estas nur simpla ludo.

Mi tute ne estas kapabla imagi ĉi tiujn kosmajn energiojn aŭ mezurojn. Se mi aŭdas, ke iu stelo estas de ni cent milionojn da jaroj malproksime, tiam mi sentas nenion. Tutsimple mi ne povas imagi ĉi tiun distancon. Ankaŭ dek-kvin-milion-grada varmo por mi signifas nenion, kaj se atomscienculo prikalkulas la efikforton de bombo dudek- kvin-megatuna, tio tute ne interesas min. La samo validas ankaŭ por la katastrofo, kiun ili povas estigi, kvankam se mi vidas suferanton, mi sentas profundan kompaton, eĉ mi riskus mian vivon, por savi el danĝero kiun ajn mian homfraton. La cifero jn dek aŭ cent mi povas potencigi, sed ne la suferojn. Tie ĉi mi staras antaŭ stranga problemo. Kio povas esti la kaŭzo, ke la sufero de unu homo tuŝas min, sed tiu de milionoj nenian (senteblan) efekton faras al mi? Tio jam estas biologia problemo — kaj tiurilate mi estas pli faksperta, ol en la atomenergio —, mi opinias, ke mi povas doni klaran respondon: mia cerbo ne estas tiel kreita, ke ĝi povu akcepti tiom grandan mezuron. Ĝi servas nur por tiu celo, ke mi povu ekzisti en mia plej proksima medio. Mia cerbo estas pensanta aparato, kaj kiel ĉiu pensanta aparato, ĝi estas taŭga por tia laboro, por kia ĝi estas farita. Mia cerbo estis farita tiucele, ke ĝi helpu min en la malgrandaj mezuroj, malgrandaj problemoj de mia ĉiutaga vivo. Ne mi konstruis ĉi tiun cerbon. Mi heredis ĝin de mia prapatro, de iu estiminda grotloĝanto. . .

Mi estas scienculo, do tiel ankaŭ en mi troviĝas iom da inklino, ke la veron mi metu antaŭ la profiton, kvankam eĉ tiel mi konstante suspektas, ke mi intermiksas la du aferojn. Kiam, eble antaŭ dudek kvin jaroj, mi ricevis grandan sumon de Nobel-premio, mi ja devis ion fari per tiu monsumo. Mi vizitis agenton kaj petis lin aĉeti por mi akciojn, sed tiajn, kies valoro malaltiĝas okaze de milito. Nome mi konis la destinon de la homa cerbo, do mi timis, se miaj akcioj altiĝas dum la milito, tiam eĉ ne vole mi deziros la militon. Mi ne volis fali en tiun situacion, ĉar en mia tuta vivo mi batalis por la paco. Venis la milito kaj mi vere perdis mian monon, sed savis mian konsciencon.

Mia estiminda prapatro kun sia familio, aŭ kun sia eta tribo loĝis en izolita groto, kaj atingis jenan moralan fundamentan veron: Ne mortigu tiujn, kiuj loĝas kun vi en la sama groto! La morala ordono de la Nuno sonas jene: „Ne mortigu tiujn, kiuj portas saman uniformon, kian vi; kiuj havas saman pasporton, kian vi, aŭ kiuj havas saman socian sistemon, kian vi!" . . , Videble nur nia groto fariĝis pli vasta, sed nia moralo ne. Mi akceptas ĉi tiun moralon, sed kun modifo. Nome la scienco kaj tekniko tiom malaperigis la distancojn, ke hodiaŭ ĉiuj vivantoj estas loĝantoj de ununura groto: tiuj de nia globeto, en kiu troviĝas loko nur por unu familio: por la homaro. Ni devas do pendigi slipon en nia groteto: EN ĈI TIU GROTO ESTAS MALPERMESITE LUDI KUN ATOMBOMBO!

La homo kun la atombombo portis el la tero kosmajn fortojn. Tio signifas, ke tutan paŝon ni devas anticipi la antaŭatoman epokon de la historio de la homaro, ni devas konstrui tute novan mondon. Kun novaj reguloj, por ke ĝustatempe ni povu ordoni halton al tiuj fortoj, kiuj, kiel mi vidas, senindulge puŝas nin al pereo!

GAZETA RAPORTO EN DECEMBRO 1968

La registaro de Usono decidis ĉesigi la financan helpon al la kanceresplora laboro de la mondkonata Usona kuracisto-biokemiisto, Nobel-premiito *d-ro Albert Szent-Györgyi*.

Albert Szent-Györgyi deklaris, ke la forpreno de la ŝtata subvencio estas *„skandala, malsaĝa ago"* kaj li tiel komentas, ke *„la mortigado estas ŝajne pli grava, ol la kuracado."* Plue li akcentas: por solvi la tutan problemon, kiu por la homaro estus unu el la plej grandaj bonfaroj, sufiĉus tiu monsumo, kiun oni elspezas *dum nur unu tago* por la milito en Vjetnamio.

— Kiel scienculo kaj humanisto — li daŭrigis sian deklaron —, mi treege bedaŭras, ke oni haltigis mian laboron, kiu celas ellabori: kiel batali efike kontraŭ la kancero. La malaltigo de la antaŭplanaj sumoj, kiuj servas por la sciencaj laboroj, endanĝerigas la pluan evoluon de la scienco en Usono.

La mondfama scienculo, parolante pri la nuna internacia situacio, pledas por tio, ke la du sociaj sistemoj en konstante vastiĝanta paca konkuro pruvu: *„kiu el ili estas pli taŭga por certigi feliĉan vivon al la homaro"*.

El la hungara
László Somlai

Nia fotoarto — János Eifert: La malĵuna vagabondo ▶



LA PLIRAPIDIĜANTA TEMPO

Estas nekutime ekvidi sciencan eseon de elstara fizikisto — en ia literatura-arta revuo. En la pasinta jaro la hungara Kossuth-premiita scienculo *György Marx* aperigis en la beletra revuo Új Írás (Nova Skribo) interesegan artikolon, titolitan „La plirapidiĝanta tempo." La eminenta esploristo de la atomfiziko kaj ŝatata sciencpopularigisto de la natursciencoj klare vidas la nuntempajn tutkulturajn problemojn de la homaro, kiuj vere kaj rajte interesas ankaŭ la legantaron de la literaturaj revuoj. De tiu eseo ni donas ĉi tie mallongan, konigan resumon.

Se ni volas bone eksenti kaj vidi la rapidecon de la evoluo, ni enkonduku kaj ekzamenu la tiel nomatan *duobliĝo-tempon*. Ĝi signifas tiun tempodaŭron, dum kiu ia ajn kvanto kreskas je sia duoblo.

En la komencaj epokoj de la homaro la nombro de la prahomoj kreskis dum 100 000 jaroj je la duobla kvanto. En la antikva epoko tiu ĉi duobliĝo-tempo plimallongiĝis kaj estis ĉ. 1000 jaroj. En la tempo de la industria revolucio tiu tempodaŭro ŝrumpis 100-jara. Sed post la dua monmilito okazis la t. n. *demografia eksplodo:* la duobliĝo-tempo de la tera loĝantaro-nombro falegis je 40 jaroj, eĉ malpli.

Ni vidu kelkajn nombro-indikojn.

Antaŭ duonmiliono da jaroj la tuta surtera loĝantaro konsistis el maksimume 50 000 prahomoj. En la antikva epoko, kiam aperis la grandaj terkulturaj popoloj, la tuta loĝantaro-nombro atingis 10 milionojn. En 1500: duonmiliardo; ĉirkaŭ 1840: unu miliardo; en 1930: du miliardoj estis la etato de la homaro. Kaj nun, post la demografia eksplodo tiu ĉi nombro estas 3 1/2 miliardoj, kaj — laŭ la demografiistoj — ĝis la jaro 2000 ĝi atingos 7 miliardojn. Do, ĝis la jarmilŝanĝo, dum tri jardekoj tuta, nova homaro naskiĝos apud ni.

Se ni ekzamenus la duobliĝo-tempojn de la kultura evoluo, ni povus konstati, ke ties daŭroj dum la tuta homa historio preskaŭ paralele sanĝiĝis kun la doubliĝo-tempoj de la homara etato. Sed en la tempo de la demografia eksplodo, do en la mezo de nia jarcento, okazis en la kultura tereno la t. n. *scienca-teknika revolucio*. Ekde tiam, la scienca aktiveco de la homaro dum unusola jardeko duobliĝas.

Tion montras ekz. la kvanto de la aperigitaj sciencaj verkoj-studoj, sed ankaŭ la nombro-plialtiĝo de la scienca-teknika personaro. El tio sekvas la stranga kaj pripensiga rezulto, ke *el inter la sciencistoj-esploristoj, iam ajn vivintaj kaj vivantaj, 90% nun, en niaj tagoj vivas kaj laboras!*

Sed la scienca revolucio signifas ankaŭ tion, ke *la duono de la sciencaj-teknikaj konoj dum unu jardeko malmoderniĝas, kaj la duono de la konoj, kiuj estos bezonataj post 10 jaroj, hodiaŭ estas ankoraŭ neatingeblaj*. Do, kiu nun komencas siajn universitatajn studojn, kiel inĝeniero dum sia tuta aktiva vivo okupiĝos pleje pri tio, kio nun ankoraŭ estas nekonata.

El tio sekvas, ke *la nuntempa fakulo ne kapablas sekvi la teorian-sciencan-teknikan evoluorapidecon sen plua, post-lerneja, eterna lernado.*

La etato de la homaro kaj la kvanto de la produktaĵoj — terkulturaj kaj industriaj — kreskis dum la historio tute paralale, kaj nun ambaŭ duobliĝas dum 40—30 jaroj. Sed la scienca-teknika evoluo-rapideco estas pli granda, ja ĝi duobliĝas po 10 jaroj. La plimultiĝanta homaro volas vivi ĉiam pli bone, pli komforte. Kiel ni vidis, la teoria scienca evoluo-rapideco donas la eblecon por la vivonivelo-plialtigo. Sed kial ne duobliĝas do la produktaĵo-kvanto dum unu jardeko?

Ĝuste tial, ĉar la diversaj fakuloj ne povas transplanti la rezultojn de la eksplodeca scienco-revolucio en la praktikon.

Se la gefiloj de iu nacio ne lernas ĉiam dum siaj aktivaj vivoperiodoj, tiu nacio rezignas la plialtigon de la vivonivelo. Ni estas ankoraŭ tre malproksime de la kompleta ekspluato de nia cerbo, nur ni devas ĝuste uzi ĝin. Ni devas lerni ĝian porestontan, necesan uzadon.

La Nobel-premiita, en Usono vivanta, hungardevena, elstara natursciencolo, *Albert Szentgyörgyi* diris: la libroj ne konvenas por tio, ke ilia enhavo estu ŝtopata en nian kapon. Prefere pravas ties kontraŭo: la libroj konvenas por konservi la konojn — ĝis ni povos utiligi ĝin por io pli saĝa.

Tio interrilatas la instruado-demandojn. Laŭ Szentgyörgyi la morgaŭo estos tia, kia estas la lernejo de l'hodiaŭ. Laŭ li, oni ne devas plenigi la junajn cerbojn per la aro de la detaloj. La diversaj instruejoj devas elastigi la cerbojn, kapabligi por la senĉesa akceptado de la novaj konoj. La fama, Nobel-premiita soveta scienculo, la fizikisto *Tamm* diris: *la disĉiplo ne estas vazo plenigenda, sed estas torĉo ekflamigenda.*

La lernitaj konoj dum unu-du jardekoj nepre malmoderniĝos. La nunaj lernantoj senĉese devos lerni ankaŭ en siaj 30, 40, 50, 60-jaraj aĝoj. *Ni estas la nuna generacio, do ni devas lerni ĝis la vivofino.*

La ĝusta, senĉesa, laŭepoka lernado donas ankaŭ la solvon de la libertempo-problemo. Kaj tio rezultos la pliriĉiĝantan mondon de la estontaj tempoj.

Ni pensas, ke tio estos la vivo vere inda por la *Homo Sapiens*, por la Homo Inteligenta.

*

La grandsignifan artikolon sekvis post ĝia apero viglaj reeĥoj — grandparte el la pedagogia flanko.

Mi opinias, ke ankaŭ ni, esperantistoj povas fruktuzi la gravajn, profundajn pensojn de la konigita eseo.

Aŭrél Ponori Thewrewk

Sándor Rákos

HEREDAĴO

filo la mondo mi transdonas ĝin
kun ĝiaj montoj riveroj leĝoj
la ŝton' faligita ĉiam falas alinfre
mi pensas plej bone se vi allasos
mi protestadis
tute vane
nutrado kreskado plimultiĝado
ĉio restis kiel antaŭe
laŭ scenarlibreto centmilionjara
mi rezignaciis je kadavromanĝado
je la glandoludo nomata amo
mi estas fidinda terloĝanto
filo la mondo mi transdonas ĝin
nur ne diru ke jam ankaŭ mia patro
filo la mondo fileto
neniam konsentu la mondon

SOVAĜBESTO

al mia step' li entrudis sin
distretis mian ripozherbejon
logmanĝon metis sub miajn arbojn
el interbranĉa altgvatej' min gvatis
mi lin evitis la unuan tagon
la duan tagon ankaŭ la trian
ne el malkuraĝo sed nur el abomeno
mi lin evitis plu tri longajn tagojn
sed je la sepa min ektedis
la aĉeco de l' gvatanto gvateja
kaj kune kun la leviĝanta suno
mi paŝis el arbdens' en senarbejon,
okulfulmo da interrigardo
mi vomis sur lin mian mortan naŭzon
sur lin kiu ektiris la ĉanon
inter moviĝo lia kaj la knalo
tiu momento estis mia vivo

Tradukis K. Kalocsay

DOMFABRIKO

La aferon baptis tiamaniere ties iniciatinto Ada *Csiszár* Pri kio temas? Pri tio, ke nian parolon nur parte ni formas per unuopaj vortoj (brikoj), parte ni uzas konstantiĝintajn vortogrupojn, vortkombinojn (panelojn). Ĉi tiu rubriko do, kiu okupiĝas pri tiaj vortkombinoj, estas komparebla al la panelo-fara domfabriko.

Tiuj vortkombinoj povas esti interapartenaj: verbo + prepozicio aŭ: verbo + objekto kun speciala senco [timi *iun*, timi *pri iu;* kalkuli *ion, kun io, je* aŭ *pri io*, ktp.; *pormeti* aŭ *pladi manĝaĵojn, meti liton, rekovri liton* ktp.), sed parte ili estas figuraj: ili ne eldiras rekte ion, sed esprimas ĝin figure per ĝia analogaĵo. Tradukanto de literatura teksto ofte trovas tiajn figurajn ,,panelojn'' kaj tiam li devas elekti: ĉu traduki ilin laŭvorte (tiam li riskas nekomprenon, ĉu traduki ilin en ordinaran esprimon (tiam li forprenas ilian specialan guston). Tiaj ,,paneloj'', cetere, jam delonge ekzistas en E-o: Zamenhof faris plurajn en sia Proverbaro, multajn el tiuj kaj aliaj registras la PV de SAT: ekz-e: *rompi al si la kapon* (forte cerbumi), *multe pezi sur la balancilo* (esti grava, decidiga), *gardu vian langon* (parolu singarde, prefere silentu) ktp. Tamen ili ne troviĝas ankoraŭ en sufiĉa nombro. Bone estus do kunmeti el ili kiel eble plej multe kaj kolekti ilin en facile utiligebla maniero.

La *guston*, la *aromon* donas al tiuj ,,paneloj'', ke ili estas ne rektaj eldiroj de penso, sed iaj metaforoj, do propre poezieskaj tropoj. Precipe multajn de tia speco uzas la vilaĝa popolo, sed ankaŭ la grandurba ĵargono kreas al si tiajn. La raport-romano ,,Dudek Horoj'' de F. *Sánta* enhavas multe da ili kaj tial ĝi estis atakata de zelotoj de lingva logikismo kiel malfacile komprenebla. Tial do nun ni volas komenci la kolektadon de tiaj ,,paneloj'', ĉi-sube sekvas 25. Ili estas hungardevenaj, aŭ almenaŭ naskitaj de la bezono traduki hungarajn ,,panelojn''. Ne ĉiam temas pri ,,spegula'' traduko; ekz-e pri pedantulo ĉiel volanta trovi ion riproĉeblan oni diras hungare, ke li ,,serĉas tuberon sur junko,'' sed sube troviĝas alia esprimo analoga.

Ni publikigas tiujn ,,panelojn'', antaŭvideble 25 ĉiunumere, unue por internacia kontrolo, due por instigi internacian kunlaboron: volonte ni envicigos alsenditajn ,,panelojn''.

Samtempe ni anoncas konkurson. Hungaroj skribu la laŭliterajn hungarajn ekvivalentojn. Ne-hungaroj klopodu trovi la ĝustan signifon de la esprimoj (kiel ĉi-supre ni prezentis tiun de unu el ili) kaj eble proponu varianton baze de sia lingvo, krome sendu sialingvajn ,,panelojn''. La aŭtoroj de la plej valoraj kontribuaĵoj ricevos librodonacon. Kaj nun jen la ĉi-numera 25.

1. Trinki la amaran sukon de io.
2. Doni fingroklakon (tajpon, fingrorulon) sur ies verton.
3. Lia kuraĝo sinkis en siajn krurojn (piedojn).
4. Bandita honoro.
5. Tio delonge premas lian stomakon.
6. La (kart) ludo ne iras pri fabo.
7. Paroli tekse-mikse.
8. Ekzerci sian langon pri iu.
9. Multaj puŝas antaŭen lian ĉaron.
10. Travidi la vualon.
11. Fari tagon el nokto.
12. Li ne diskrios tion sur la stratoj (ne metos tion en sian fenestron).
13. Enkuri kune kun la pordo.
14. La kalkulo strabas.
15. Aĉeti ion por iom da neniom.
16. Ne valoras eĉ lignan groŝon.
17. Ne deziri esti en ies haŭto.
18. Kun haŭto kaj haroj.
19. Eltordi la kolon al la vero.
20. Ĉies kaj nenies havo.
21. Serĉi angulojn sur ovo.
22. Forlasi iun kure-senspure.
23. Trafi bovinan mamon inter la kornoj.
24. Tio estis regalo sen egalo.
25. Foruzi siajn piedojn pro (por) io.

K. Kalocsay

La konstruiĝanta Budapeŝta Metro

Konstanta problemo estas en la metropoloj la moderna organizo de la trafiko. Ankaŭ Budapeŝto, nia ĉefurbo, jam de jardekoj klopodis modernigi la urban trafikon, aĉetis amase tramveturilojn, aŭtobusojn kaj trolejbusojn.

Sed jaro post jaro ankaŭ ĉe ni multnombriĝis la diversaj veturiloj, ĉefe la aŭtomobiloj, kaj ne plu estis eviteblaj la tumultoj ĉe la vojkruciĝoj kaj sur malnovaj, nesufiĉe larĝaj stratoj.

La neceso je la subtera fervojo anoncis sin jam komence de la nuna jarcento. Ni povas esti fieraj, ke la unua subtera — pli ĝuste subkrusta (senpere sub la strata pavimo konstruita) — elektra fervojo konstruiĝis en Budapeŝto jam en la jaro 1896.

Post la dua mondmilito la ministerio por trafiko kaj poŝto komencis la planadon de la Budapeŝta subtera fervoja retaro. Laŭ la akceptitaj planoj la ĉefaj arterioj de la Budapeŝta trafiko estos la orient-okcidenta kaj nord-suda-direkta fervojlinioj. Poste oni konstruos radiodirektajn fervojojn, kiujn oni kunligos per ringformaj linioj. La konstruado okazas laŭ la profundkonduka sistemo, simile al la METRO en Moskvo kaj en Parizo.

La konstrulaboro komenciĝis per la pretigo de tiel nomataj *konstruaj ŝaktoj*. Tiujn ĉi ŝaktojn oni estigis proksime al la konstruotaj linioj sur vakantaj grundoj, por ke ili ne ĝenu la urban trafikon.

Kiam la ŝakto estis preta, sekvis la konstruado de la *labortunelo*, kiu kunligas la ŝakton kun la konstruota fervoja linio-tubo. Tra la labortunelo oni transportas la konstrumaŝinojn, la diversajn materiojn, la laboristojn ktp. La transportado okazas per vagonetoj, kiujn tra la ŝaktoj lifto portas supren kaj malsupren.

Kie la labortunelo kaj la konstruota linia tubo krucas unu la alian, oni konstruas la tiel nomatan *ŝildkameron*.



Tiuj ĉi ejoj, kies fundamentamplekso estas sesoble ok metroj kaj la alteco de ok ĝis dek metroj, servas por munti la borilŝildojn kaj helpmaŝinojn, per kiuj oni konstruas la tubformajn tunelojn.

La subtera fervojlinio estas konstruata samtempe en du paralelaj *tunel-tuboj*. La plej malgranda radiuso de la voj-kurbo estas kvarcent metra, kaj la plej granda deklivo estas tridek miligradaj. La distanco inter la stacioj estas proksimume unu kilometro.

La konstruado de la stacioj ĝenerale okazas per borŝildoj, kies kalibro estas 5—5-metra. La stacioj estas konstruitaj el 3 aŭ 5 paralelaj tuneltuboj.

La kajoj estas tiel longaj, kiel la plej longaj trajnoj, kaj la nivelo de la kajoj estos sama, kiel la plankoj de la vagonoj. La en kaj elvagoniĝo okazos do sen ŝtupeto.

La pasaĝerhalo kaj la kajo de la tuneltubo kune formas grandan halon, en kiu fortaj kolonoj — en distanco de 4 metroj — tenas la volbojn.

De la supra antaŭhalo ĝis la malsupra halo estas konstruitaj oblikvaj, tubformaj tuneloj, en kiuj funkcios la *moviĝanta ŝtuparo*.

La profundkondukaj linioj grandparte estas pretaj. Speciala kaj interesa etapo de la konstruo estas ankoraŭ la borado sub la riverego Danubo, kie la borilŝildoj laboras en argilo. La *subriveregaj tuneloj* estos 450 metrojn longaj, kaj inter ili estos 20 metraj distancoj. Sur la Peŝta flanko la stacioj baldaŭ estos finkonstruitaj. La muroj kaj plankoj de la stacioj estas kovritaj per facile purigeblaj, fortaj materioj (granito, marmoro, mozaiko), la plafonon oni kovras per aluminilamenoj.

Artefarita ventolado certigas la aerŝanĝon. La ventoliloj estas lokigitaj je po unu kilometro.

La lumigado de la tuneltuboj multoble estas certigita. La diversaj kabloj estas lokigitaj sub la kajoj, en la koridoroj kaj tuboj.

La trajnoj de la subtera fervojo

konsistas el ŝtalskeletaj kvaraksaj motorvagonoj. La *motor-trajnoj* konsistas el du, kvar aŭ ses motorvagonoj. Ĉiujn aksojn movas apartaj elektromotoroj, kiuj certigas konvenan akceliĝon. La trajnoj povas iri kun rapideco hore po 70, maks. 90 kilometroj, kaj post la ekiro, kiam ĝi atingos la finon de la kajo, jam iros kun rapideco, proks. 50-kilometra.

La vagonoj estas importitaj el Sovet-Unio, ilia longo estas 20 metroj kaj la larĝo 2,7 metroj.

Ĉiu vagono havas komfortajn sidlokojn por 200 pasaĝeroj, kaj la en- kaj elvagoniĝo okazas tra larĝaj duopaj pordoj funkciigataj de la lokomotivestro.

La motorvagonoj ricevas la kurenton tra la tria relo, kiun oni fabrikis el speciala materio, por ke la likado pro la induktanco estu kiel eble plej malgranda.

En la tuneloj oni povas trovi je po 350 metroj trikoloran lumsignalon, kiu funkcias aŭtomate kaj informas la lokomotivestron kontinue pri la loko de la antaŭaj trajnoj. Kompreneble aŭtomataj bremsoj certigas la haltigon de la trajno en eksterordinaraj okazoj. En ĉiu trajno ĉeestas krom la lokomotivestro teknika akompananto, ankaŭ kiu scipovas konduki la trajnon.

Laŭ la plano sur la unua linio de la subtera fervojo oni trafikigos trajnojn unu post la alia, ĝenerale post tri minutoj. Poste se necesos oni povos plidensigi la trafikon kaj trafikigi tage po 300 trajnoparojn.

La konstruata linio orient-okcidenta ekfunkcios la 4-an de aprilo en 1970, kunligante la ĉefajn urbajn trafiknodojn kaj novkonstruitajn loĝkvartalojn de Budapeŝto.

La stacioj distancas proksimume po unu kilometron. El ili estas menciindaj la ,,Stadiono'', la Orienta Stacidomo (placo Baross), placo Blaha Lujza (ĉe la kruciĝo de Granda Bulvardo, Nagykörút) kaj Avenuo Rákóczi, la ,,Astorio'' (nomo de hotelo, kie kruciĝas la strato Kossuth Lajos kaj bulvardo Tanács), placo Deák, kie havas stacion ankaŭ nia subkrusta fervojlinio, funkcianta seninterrompe jam de 1896.

La provizora finstacio estos proksime de Danubo, sub kiu jam estas traboritaj ambaŭ tuneloj, kiuj estas konstruataj samtempe kun la linioparto sub la urboparto Buda. Pri tiu linio ni informos niajn legantojn aliokaze.

d-ro István Bácskai

NIA HUMURO

La infano demandas

— Paĉjooo!
— Diru!
— Ĉu la vorton *sunsupreniro* oni skribas per unu aŭ du vortoj?
— Ĉu sunsupreniro? Jam denove vi divenis ion por distordi nian karan, ŝatatan patran lingvon?
— Diru, ĉu sunsubiro ekzistas?
— Jes.
— Do, kial ne same: sunsupreniro?
— Mi estas okupata. Ĉu komprenite?
— Jes, komprenite. Sed, paĉjo, la suno ne turniĝas, ĉu?
— Ne.
— Sed la tero turniĝas.
— Jes, ĝi turniĝas.
— Tiam la tuta afero ne estas bona.
— Kio ne estas bona?
— La sunleviĝo kaj la ceteraj.
— Jam denove vi turmentas min per tiu . . .
— Mi ne turmentas vin, nur estas malbone, ke vi, gepatroj ne ŝatas la veron. Se vi ŝatus ĝin, vi instruus nin jene: *tersuprenturniĝo, tersubturniĝo.*
— Hooo! Konstante vi nur turmentas min per iaj sensencaĵoj. Anstataŭ, ke la lecionon . . .

— Paĉjoooo!
— Kion do?
— Kiam vivis la ŝumeroj?

— Antaŭ la tempokalkulo.
— Ĉu antaŭ la tempokalkulo? Sed se oni ne kalkulis la tempon, kiel estas eble scii, ke antaŭ kiom da tempo tio estis?
— Khm. Khm. Mi jam diris, ke havas multan laboron.
— Nu, diru jam, kiam iradis la ŝumeraj infanoj al la lernejo? Ĉu antaŭ mil jaroj?
— Pli multe. Almenaŭ antaŭ sesmil jaroj.

— Jen, paĉjo, kiaj vi estas!
— Kiuj?
— Vi, gepatroj. Vi kutimas diri, ĉu ne, lernu filineto, lernu fileto, kaj tiel plu!

— Kion vi volas diri per tio?
— Ĉar jes, mi legis, ke al la ŝumeraj infanoj la paĉjoj kaj panjoj ĉiam diris: lernu, ke vi prosperu, — kaj ke la gepatroj multe laboras kaj penadas por vi, ke vi povu lerni.
— Hm. Khm. Hm.
— Nu, ĉu vi vidas?! De sesmil jaroj vi diradas ĉiam la samon. Dume estas tamen vi, kiuj parolas pri evoluo! Kaj jen, mi mem devas diveni la ĝustan vorton: *sunsupreniro* . . . Mi enskribos ĝin, ĉu bone?
— Skribu! Ke ankaŭ via instruistino havu iom da ĝojo!

Skribis: B. Cs.
Tradukis: Tibor Ujlaky-Nagy

BABELA HUMORO

Paris Match *skribas pri gasto, kiu en la franca ĉefurbo havis negocajn traktadojn. Oni donis vespermanĝon je lia honoro, kaj en la bona etoso el ĉiuj fluis la vortoj. La gasto surprize spertis: kion ajn li diras, el la ĉeestantoj subite eksplodas la ridego, kiam oni tradukas liajn vortojn. Li turnis sin al la interpretisto:*

— Diru, mi petas, kial oni ridas tiel bone pri ĉio, kion mi rakontas?

— Ne koleru, sed vi parolas tro rapide, kaj mi estas devigata rakonti anstataŭ la traduko de viaj vortoj miajn proprajn ŝercojn.

*

Konskij, la eminenta soveta reĝisoro faris provon el la dramo Tanja kun la ensemblo de la Hungara Nacia Teatro. La fama reprezentanto de la skolo Stanislavskij precipe emfazis la pedantan ellaboradon de la psikologiaj turnoj. Foje pro la supraĵa prezentado de la sceno, li haltigis la provon, kaj almenaŭ dum kvin minutoj li klarigis, kiajn pensojn kaj sentojn oni devas esprimi. La ne tro preciza interpretisto jene transdonis lian fervoran, travivitan instruadon: ,,La sinjoro reĝisoro diris, ke la sceno provizore estas ankoraŭ malbona.''

*

Geedzoj rakontis ĉarman historion. Pasintsomere por ferii ili aŭtoveturis en Francion. Ili decidis ligi la agrablan kun la utila, nome survoje ili parolos ekskluzive nur en franca lingvo, por pliigi sian lingvoscion.

En Parizo ili ekscitite mendis la unuan tagmanĝon, nature en franca lingvo. La kelnero balancis sian kapon, ĉion li notis, poste foriris en direkto de la kuirejo. Sed post unu minuto li revenis kaj kun profunda ĝentileco li diris:

— Sinjoro, vi parolas bonege france, sed la kuiristo komunikis, ke bedaŭrinde, li ne povas fari ovolegomaĵon kun ĉokolada saŭco.

Kunmetis: Imre Szenes
Tradukis: L. Kökény

D-RO ISTVÁN SZERDAHELYI

ESPERANTO-INSTRUADO: METODO KAJ METODOJ

2a daŭrigo

La demando estas nun: laŭ kiu metodo oni instruu Esperanton?

La unua respondo al tiu demando devas esti: laŭ *kombinita*. Kial? Ĉar ĉiu „ekskluziva" metodo ĝis nun fiaskis. Nur la proporcia kombino de ĉiuj pruvitaj pozitivaj elementoj de diversaj metodoj kondukas al solvo. La kontingento de tiuj elementoj dependas ĉiam de la konkretaj cirkonstancoj.

(Kiel ni vidos poste, ankaŭ la Ĉe-metodo estas siaspeca kombinita metodo.)

Kiuj *faktoroj* difinas tiun kombinaĵon?

Unue: *la karaktero de la studobjekto*, en nia kazo, la karaktero de Esperanto kiel lerneja studobjekto.

Esperanto estas lingvo, sekve la problematiko de ĝia instruado apartenas al la ĝenerala metodiko de lingvoinstruado. (Cetere, estas kelkaj ĝeneralaj principoj kiuj validas sendepende de la karaktero de la studobjekto, ekzemple: *„Unue demandu kaj poste alvoku la lernanton, neniam inverse"*.)

La sistemo de instrumetodaj principoj elirante el ĝeneralaj ĉiam pli kaj pli konkretiĝas laŭ la skemo:



La principoj de Esperanto-instruado sekvas la vicon: lingvo, fremda lingvo, vivanta lingvo, artefarita (formaligita) lingvo.

La dua faktoro estas: *la gepatra lingvo de la lernantaro*, t. e. la bazo, sur kiu estiĝas la interferenco per la apudmeto de la du lingvoj. Se la unua faktoro prezentas ĉefe lingvistikan problemon, tiu dua estas grandparte jam psikologia. La skalo de tiu problemaro estas: laŭ opozicioj:

fremda lingvo – gepatra lingvo
fremda lingvo – Hungara lingvo
Esperanto – Hungara lingvo

Sekvas poste: *la celo de la instruado, la konsisto de la lernantaro (aĝo, antaŭkonoj), la formo de instruado (lerneja, kursa; taga vespera, koresponda; deviga, fakultativa ktp.)*

Observante tiujn faktorojn la metodologoj devas antaŭ ĉio *plani la instrumaterialon*. Per ekzaktaj rimedoj oni devas kvazaŭ „mezuri" kaj „kalkuli" ne nur „kion?" sed ankaŭ „kiom?" oni povas instrui en la konkretaj cirkonstancoj.

La lingvo estas ampleksega, komplika kaj ege kompleksa fenomeno. „Ataki" ĝin sur ĉiuj frontoj samtempe estas neeble. La unua paŝo estas: *la segmentado de la lingva materialo*. El la tuto ni devas detranĉi segmentojn, mikroorganismojn, kiuj en limigitaj kadroj kapablas memstare funkcii. La principon (sed ne la proporciojn!) ni povas prezenti per la figuro.

La dua paŝo post la segmentado estas *la organizado de la materialo*, t. e. ĝia prilaborado por la instruado. Tiu organizado realiĝas en la lernolibroj. La lernolibro aranĝas la diserigitan isntrumaterialon laŭ certaj unuoj (lecionoj, paragrafoj), observante la kvar evoluigendajn baz-kapablojn: skribon, legon, komprenon kaj parolon *el kiuj gravas ĉefe la parolo*. La fundamenta principo de tiu organizado estas: la lingvo, kiel materialo, dum la instrua procezo estas sistemo de konoj, la parolo – estas sistemo de kapabloj. La konoj estas akireblaj per lernado, la kapabloj – per intensa ekzercado. La praktika celo de la lingvoinstruado estas elformi en la lernantoj la kapablon praktike uzi la konojn, aŭtomate paroli ĝin. La konoj estas rimedoj, kiuj plifaciligas la elformadon kaj firmigon de la kapabloj. Tiu fenomeno realiĝas dum la tria etapo: *la instruado mem.*



L = lingvo
G = gramatiko
F = fonetiko
I., II., III., ... = lernojaroj

Skeme:

1a etapo	*2a etapo*
SEGMENTADO	*ORGANIZADO*
leksika, gramatika kaj fonetika minimumoj	lernolibro: legaĵoj, ekzercoj, taskoj; bildoj, diafilmoj, magnetofonaj bendoj, ktp.

3a etapo

INSTRUADO

prezentado ekzercado aplikado
kontrolo
konoj + kapabloj = praktika uzo

Reveninte nun al la enkonduka demando: laŭ kiu metodo oni instruu Esperanton? ni povas iom plilarĝigi la respondon: *laŭ tiu metodo, kiu post scienca segmentado kaj organizado de la studmaterialo taŭgas plej facile, rapide kaj firme evoluigi la baz-kapablojn, ĉefe la parolkapablon.*

Kiel nomiĝas tiu metodo?

La respondon al tiu demando vi trovos en la sekva numero. *(daŭrigota)*



LA HUNGARA UZINO DE OPTIKAĴOJ

Budapest 114. Pf. 52. Telex: 259.

Produkta sortimento:

Geodeziaj instrumentoj
Laboratoriaj instrumentoj
Vitrofadenaj medicinaj instrumentoj
Periferiaj unuoj de komputeroj
Okulvitro-lensoj
Okulvitro-garnaĵoj
Fluid-mezuriloj
Vekhorloĝoj
Optikaj iloj
kaj aparatoj
Diversaj
mezuriloj
kaj kontroliloj

MOM
BUDAPEST

La plej bela eksportaĵo de Hungarlando:

MUZIKA EDUKADO

„Ĝis proksimume 1925 mi vivis kiel aliaj fakmuzikistoj, t. e. mi tute ne zorgis pri la lernejo, kredinte, ke tie estas ĉio en ordo. Oni laboris tie, kiel oni povis kaj tiuj, kiuj ne havis muzikajn orelojn, definitive perdiĝis por la muziko. El tiu ĉi iluzio mi vekiĝis per hazarda okazo. Estis bela printempa tago. En la „Buda" montaro mi renkontiĝis kun ekskursanta grupo de knabinoj. Ili kantadis. Mi haltis kaj aŭskultis ilin dum kelkaj minutoj. Mi ĉiam pli hororis pro tio, kion ili kantis. Ankaŭ tion mi eksciis, ke ili estis lernantinoj de Budapeŝta Pedagoga Altlernejo. Tiam mi konstatis, ke la instruistinoj kaj patrinoj de la sekvonta generacio edukiĝas en tuta muzika mizero, pli damaĝa ol analfabeteco. Hodiaŭ mi dankeme memoras pri la senvaloraj kantetoj, ĉar estis ili, kiuj igis min pensadi, kion oni devus fari . . ."

Ĉi tiujn vortojn skribis *Zoltán Kodály* (1882—1965), kreinto de la jam tutmonde konata muzikeduka metodo, kiun oni nomas kurte *„Kodály-metodo"*.

De Japanujo ĝis Usono, de Kanado ĝis Francujo centoj da muzikinstruistoj studadas la Kodály-metodon. Multaj el ili vizitas Hungarlandon por lerni la teorion kaj vidi la aplikadon de la novaj metodoj kaj la rezultojn. Kiujn rezultojn? Oni povas vidi (kaj aŭdi) la rezultojn, se oni ĉeestas koncertojn organizatajn por industriaj lernejanoj, se oni vizitas horojn de laboristoj kaj vilaĝanoj, ĉar la Kodály-metodo estas ne nur metodologio por pli facile, pli rapide kaj pli plezure lerni muzikon, kantadon, sed unuavice ĝi estas edukilo por miloj de estontaj muzikamantoj kaj komprenuloj.

Do, se ni parolas pri la muzikeduka Kodály-metodo, ni devas pensi ankaŭ pri tiuj ĉi rilatoj.

Ne estis facile konvinki la konservativulojn de la tridekaj jaroj pri la valoro kaj vivkapableco de la nova ideo kaj metodo. Malmulto okazis antaŭ la milito. Post 1945 prezentiĝis la granda ebleco. Zoltán Kodály povis, per grava ŝtata financa kaj morala patronado, efektivigi sian grandan revon.

La hungara popolkanto ekokupis sian meritan pozicion en la lernejoj kaj sur la koncertpodioj. Komencis luktado inter la vera popolmuziko kaj la kiĉa popoleska muziko. Dank' al la granda talento kaj energio de Kodály kaj al lia konstante kreskanta reputacio en- kaj eksterlande, la nova ideo venkis. Estiĝis elementaj lernejoj, en kiuj muziko estas la ĉefa lernobjekto. Komence oni dubis la sukceson de la Kodály-metodo, sed la rezultoj konvinkis la dubulojn: la gelernantoj de ĉi tiuj lernejoj havis pli bonajn rezultojn ankaŭ en aliaj lernobjektoj, ol la gelernantoj de normalaj lernejoj. La sekreto estas: per helpo de instruado en muziko oni igas la gelernantojn pensi abstraktmaniere kaj la akirita kapableco helpas al ili en studobjektoj, kie abstrakta pensmaniero estas grava, precipe en matematiko.

Estas kompreneble, ke en tia mallonga artikolo oni ne povas klarigi la esencon de la Kodály-metodo. Multaj libroj kaj eseoj

Elizabeta Szőnyi kun siaj Usonaj gelernantoj

estas skribitaj pri ĝi, kursoj estas organizataj en Hungarlando kaj eksterlande por interesiĝantaj muzikinstruistoj.

Ĉiujare centoj da studentoj kaj muzikinstruistoj venas al Hungarlando kaj pasigas semajnojn, kelkaj eĉ monatojn ĉi tie kaj hejmenirinte ili provas apliki la hungarajn muzikedukajn metodojn.

Mi vidis entuziasmajn muzikinstruistojn el Japanujo kaj Usono rigardantajn kaj aŭskultantajn instruiston kaj gelernantojn en provinca urbo, infanvartistinon kaj geknabetojn de Budapeŝta infanĝardeno. Fotografistoj eksponis, magnetofonoj funkciis, notoj kolektiĝis en notkajeroj. Sed la Ministerio por Klerigaj Aferoj kaj la Instituto por Kulturaj Interrilatoj organizas ankaŭ pli longajn studvojaĝojn por eksterlandanoj. *Grupo de 10 Usonaj muzikinstruistoj ĝuste nun preparas sin reiri hejmen post 10-monata restado kaj studado en Hungario.* Ili (9 junaj virinoj kaj unu viro) partoprenis kursojn en la Muzikakademio, kie — sub gvido de la konata profesorino *Elizabeta Szőnyi* — ili ekkonis la teorion de la Kodály-metodo. Intertempe ili vizitis lernejojn en la ĉefurbo, poste ili pasigis kelkajn monatojn en lernejoj de du provincaj urboj: Kecskemét kaj Székesfehérvár. Ili ne nur ĉeestis la lecionojn, sed ili ankaŭ partoprenis en la instruado mem, instruinte hungarajn geknabojn hungarlingve. (Nome dum la restado en Hungarlando ili lernis hungare.) Ili estas jam entuziasmaj Kodály-disĉiploj kaj hejmenirinte ili provos transplanti la hungarajn muzikedukajn metodojn kaj ideojn en la Usonan eduksistemon.

Estas ankaŭ aliaj eksportmanieroj en la disvastigo de la hungaraj muzikedukaj metodoj. Multe da hungaraj muzikinstruistoj estas invitataj eksterlanden, por ke ili instruu centojn da muzikinstruistoj avidaj je novaj kaj fruktodonaj metodoj kaj ideoj. La plej eminenta „migranta ambasadorino" de la Kodály-sistemo estas Sinjorino Szőnyi, profesorino de la Budapeŝta Muzikakademio. Ŝi vizitis jam preskaŭ tutan Eŭropon, multajn landojn en Azio kaj Ameriko disvastigante la hungarajn metodojn.

Sed estas ankaŭ aliaj meritaj adeptoj, kiuj eksterlande disvastigas la Kodály-metodon. Unu el ili estas Sinjorino *Ilona Bartalus*, instruistino de ĉefurba elementa faklernejo muzika. Ĉi-jare ŝi vojaĝos la duan fojon al Toronto, *kie ŝi instruos* — en kadro de someraj kursoj *proksimume naŭcent (!) Kanadajn muzikinstruistojn pri la Kodály-metodo de la muzikinstruado.*

Sinjorino Bartalus estas ne nur rekonita fakulino de la muzik-instrua metodo, sed ŝi estas ankaŭ komprenema amiko de Esperanto.

Dum la 5-semajna kurso ŝi instruos Kanadajn popolkantojn per hungaraj metodoj. Nome ĉi tiuj metodoj ne estas ligitaj al la hungaraj popolkantoj. Ili estas transponeblaj al popolkantoj de iu ajn nacio. Tiel iĝas la Kodály-metodo internacia. Muziko kaj kantado estas internaciaj, kiel la lingvo Esperanto.

Gábor Vigh

KORESPONDI DEZIRAS

23-jara itala junulo kor. kun hungaraj fraŭlinoj. P u r a c c h i o Pino, 00179 ROMA, Via Rocca di Papa 28.

Ricard T a m m i k, Rakvere, HULJA, Sovet-Estonio, kor. kun hungaroj kaj int. PM.

La Societo „Esperanto" ĉe la Moskva Universitato, MOSKVO V—311, ab. jascik 739 kor. kun E-societoj de alilandaj universitatoj.

17-jara fraŭlino kor. pri literaturo, teatro, arto, sporto, muziko (big-biat), int. sondiskojn, BK. Irina Sahmatova, SOCI-centr. de vostrebovanija, USSR.

24-jara studento Imre D é n e s, kor. pri elektroniko, literaturo, sporto, int. BK kaj PM. Str. Paris No 103, CLUJ, Rumanio.

Melinda N a g y, VIFOROASA, Str. Principala 18. Jud. Mures. — Rezső F a n c s a l i, Sing. de Padure, Str. 1 Mai 22. Jud. Mures. — Erika G e c s e, Balauseri, Str. Principala 277. — Ĉiuj tri 18-jaraj lernantoj en Rumanio ŝatus kor. pri diversaj temoj. Ni fondis E-grupon kun 20 membroj en nia lernejo.

Jenő N á d o r, TISZAPÜSPÖKI, Hungario, int. BK. kun Italio, Francio kaj Norvegio.

18-jara studentino Barbara K r a n z, ul. Mardilewskiego 28, Pollando, kor. pri literaturo, muziko, geografio, fotoarto, fremdaj lingvoj, junularaj problemoj, sporto. Kol. BK kaj diskojn.

18-jara studento Paul M i l e r, ul. Staropoznanske 309, INOWROCLAW—MARTWY, Pollando, kor. pri literaturo, turismoj, int. PM kaj BK.

Maria S t r z e l e c k a, oficistino, Laska 28, ZDUNSKA WOLA, Pollando, kor. pri literaturo kaj turismo, int. BK.

Frederico Garcia Lorca

Poemaro, elhispanigis K. Gusev, Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj, Moskvo, 1968, 78 paĝoj, multobligita.

Ĉiu kajero de niaj Moskvaj kamaradoj surprizas nin per aktualeco de temoelektado kaj lerta prezentado. El la antaŭaj kajeroj la esperantistaro ekkonis kantojn popolajn, komponaĵojn de novaj kaj malnovaj komponistoj, perlojn el kulturtrezoro de diversaj sovet-respublikoj. Preskaŭ en ĉiu kajero aktive kunlaboris K. Gusev, la tradukinto de la prezentata kajero. Lia lingva sperteco kaj tradukista lerteco entreprenigis lin solvi tiel malfacilan taskon, kiel la nuna. Parte li sukcesis. Sed dum la transplantado la Lorca-bildoj paliĝis, perdis la specialan hispanan aromon kaj guston iom pli, ol ĝenerale perdas tiujn la originalo dum la tradukado. Eble ĉar la elrusigitaj versaĵoj de Gusev alkutimigis nin al pretendemo.

Sz—

LETERKESTO

Prof. László Zinner, S. Paulo, Brazilo. Antaŭ 30 jaroj vi ekzameniĝis el Esperanto en Budapeŝto, kaj nun — kiam post tiom multe da jaroj vi ricevis la ekzamenan atestilon — vi skribis al ni leteron. Ni bone rememoras, ke antaŭ pli ol tri jardekoj vi organizis tre viglan Esperanto-movadon en Ujpest (nun la IV-a distrikto de nia ĉefurbo), kaj tio estas inde notita ankaŭ en historia libro de Ujpest. Ni scias, ke en via nova patrujo vi akiris altan reputacion kiel skulptoartisto. Kara Amiko, ni citas ankoraŭ el via letero kelkajn frazojn: „Antaŭ la morto de nia ŝatata Baghy mi ricevis lian leteron el la hospitalo — eble unu el liaj lastaj skribaĵoj. Mi korespondis ankaŭ kun Francisko Szilágyi . . . Mi havas foton kun Adam Zamenhof (1939) kaj familio, kiam mi kun alia esperantisto akompanis ilin al Margitsziget . . . Mi havas foton ankaŭ kun Karinthy. Mi gardas ilin ĵaluze." Ni salutas vin kore.

Jan Oajlo, Tallinn, Sovet-Estonio. Kun profunda emocio ni legis en via letero — sendita al Paŭlo Tolnai —, ke la estonaj esperantistoj volonte helpos la aperigon de „Elektitaj Poemoj" de Petőfi. La helpo estas granda: transpreno de kelkaj cent ekzempleroj de la verko. Jen, niaj artikol(et)oj alportis la deziratan sukceson. La promesita grandskala antaŭmendo de la poemaro el Estonio, la preskaŭ sammezura interesiĝo en Germana Demokratia Respubliko, kaj ankaŭ la jam daŭranta varba agado, ke la hungaraj esperantistoj per antaŭmendo certigu por si la poemaron de nia plej eminenta lirikisto — kaj fine ankaŭ oficiala kaj privata subteno esperigas nin, ke post nelonga tempo — ni diru: finfine ! — aperos la „Elektitaj Poemoj" de Petőfi en traduko de Kalocsay.

D-ro Ferenc Jáki, Budapeŝto. Gratulon al vi, kara Kolego, kiu verkis prelegon pri la poemo de Petőfi „Fine de Septembro" kaj gratulon ankaŭ al redaktoro Lajos Pusztai, gvidanto de la Esperanto-dissendoj de Radio Budapest, kiu akceptis ĝin por disaŭdigo. Ni represigas nur la enkondukan parton: „Kiel bela povas esti la originala poemo, se ĝi estas tiom ĝuebla ankaŭ en arttraduko" — diris al mi entuziasme mia finna esperantista amiko, Kostiainen, pri la poemo de Sándor Petőfi: „Fine de Septembro". — Antaŭ kelkaj semajnoj menciis la saman poemon du niaj Okcident-Germanaj aŭskultantoj, Jozefo Kondor kaj Walter Kaukal, kiuj la hungaran kaj la Esperantan tekstojn eternigis per sonbendo. — Kaj antaŭ kelkaj tagoj ni ricevis tradukaĵon el Bagdad de Hussen al Amili. La poemo aperis en la gazeto „Bagdad Observer" — en angla lingvo, sed kun utiligo de la Esperanta traduko de Kálmán Kalocsay. — Laŭ la ekspertoj de la poezio de Petőfi, tiu ĉi poemo estis tradukita al la plej multaj lingvoj, tiun ĉi poemon de Petőfi oni konas pleje en la mondo. — Jes, la „Elektitaj Poemoj" de Petőfi certe enhavos tiun ĉi ĉarman juvelon de la tuta mondliteraturo.

Prof. Ernő Farkas, Szeged. Ni gratulas kaj dankas vin, ke via tre interesa artikolo en H. V. (1968/2): „Mia renkontiĝo kun sekretario de Leo Tolstoj" alvokis la atenton de sovetaj literatoroj, kaj laŭ via aparta instigo s-ro Victor Lebrun vojaĝis al Moskvo kaj Jasnaja Poljana. Ni estas fieraj, ke ni povis kontribui al tiel grava kultura misio. Ni mem forte emfazas, ke ankaŭ Hungara Vivo, neniam hezitos ankaŭ estonte akceli la kulturajn kontaktojn de ĉiuj popoloj.

K-do Teodoro Kulagin, Moskvo, G-309, Bol. Filevskaja ul. d. 23, korp. 3, kv. 7. Unue: ni tutkore dankas kaj reciprokas viajn gratulojn kaj bondezirojn. Kredu al ni, kara Kamarado, ni mem estos tre feliĉaj, kiam en Sovetunio aperos multe pli bela kaj altnivela revuo, ol nia H. V. — Ni vidas, ke ankaŭ vi laboras konscience por la plena rekono de Esperanto. El viaj informoj ni mencias nur la plej gravajn: Vian klubon MIEK lastatempe vizitis eksterlandaj samideanoj, inter aliaj László Szőke el Budapeŝto kaj Tibor Sekelj el Jugoslavio. — Vi informis nin, ke en la Moskva E-Klubo estis aranĝita Turgenev-vespero, dediĉita al la 150a-jara naskiĝo-datreveno. Prof. Bokarev detale analizis la verkojn de Turgenev, tradukitajn al Esperanto.

(L. K.)

El la leteroj — sen komentario

JAN SZMURLO, POLLANDO, ZAKOPANE, WIETKIEWICZA 19. — De fidela abonanto de Hungara Vivo, bonvolu akcepti la plej sincerajn gratulojn pro la nova, unua ĉi-jara numero de via revuo, kiu denove suriris novan pli altan ŝtupon: alloga estas la eksteraĵo (belegaj desegnaĵoj de Kass), interesa, riĉa, lingve altnivela enhavo — dankon en la nomo de la legantaro. Vortojn de la speciala rekono — por la „Gasta paĝo" — atesto pri klarvido kaj saĝeco kaj krom tio: estas konate tra la mondo: la hungara gastamo ne estas blefo . . . Min ĝojigas ankaŭ la impona eldonkvanto kaj pligrandiĝo de reklampaĝoj. Tio ĉi ĉiam faciligas intertraktadon kun la mecenato kaj finfine atestas, ke Esperanton kredas ne nur ni, esperantistoj, sed ankaŭ homoj, kies profesio postulas realisman kalkuladon.

PANAS VASILČENKO, POŜTKESTO 375, KIEV 24. USSR. — Kiel printempa flamsaluto! Plenajn sukcesojn en via nobla agado! Hungara Vivo en nova vesto kun nova diversriĉa enhavo bonege aspektas. Gratulon! . . .

LAJOS VARGA, BUDAPEST, VIII. FUTÓ U. 14. — Kun ĝojo mi atendis la Hungara Vivon, sed kiam mi ekvidis la desegnaĵon sur la unua paĝo, tuj mi indigniĝis; kiel vi povis per tiu ĉi desegnaĵo malbeligi la unuan paĝon de HV? . . .

MARIA VITÁLYOS, TIRGU, SECUIESC. C.P. 14. RUMANUJO. — Ĝoje mi ricevis la numeron 1/1969 de Hungara Vivo en ĝia nova formo. Mi gratulas al vi kaj mi estas tre fiera, ke nia revuo estas tiel valora, enhavplena kaj belaspekta . . .

JOHANES PALU, TALLIN 16, SOLME 21, ESTONIO, USSR — Mi ĵus ricevis la n-ron 1 de 1969 en tute nova eksteraĵo kaj nova interna divido. La revuo denove faris plaĉan surprizon per kvazaŭ tute nova enhavo. Ankoraŭ ne ĉion mi sukcesis tralegi, sed jam povas diri, ke multo en la nova numero estas tre valora kaj necesa. Por ekz. la grandskalaj anoncoj, kiuj en nia lingvo preskaŭ ne aperas, sed ili ja estas tiom necesaj! . . . Eble mi kiel elektristo estas iom tro „fakema", sed nuntempe ni vere ne plu povos ĉirkaŭiri la teknikon en nia ĉiutaga vivo, kaj sendube esperantistoj devas scii almenaŭ la ordinarajn fakvortojn de la elektrotekniko kiel la plej disvastiĝintajn. Sed ĝis nun pri tiuj vortoj neniu revuo ion aperigis! Ni ne plu povos vivi per la dolĉaĵoj de sola poezio, ni bezonas lingvon por ĉiutaga uzo — kaj por tio mi diras mian koran dankon al Hungara Vivo. S-ano Wensing pravas, kiam li diras, ke ni evoluigis nur la poezion, sed forgesis la realan vivbezonaĵon — kaj Hungara Vivo estas sur ĝusta vivovojo, donante a m b a ŭ ! . . . Sur la „Gasta paĝo" mi volonte vidos ne sole la poezion, sed ankaŭ artikolojn pri „ĉiutaga pano . . ."

El la 3-a numero de Hungara Vivo

Mór Korach: Pensoj pri la internacia lingvo
V. Benczik, L. Kökény, P. Pados: Diskuto pri la arto de Julio Baghy
Lajos Tárkony: Esperanto—poemo
A. Simonffy: Bonega tago — novelo
Nuntempa hungara poezio: István Simon
Originala esperanto prozo: Vilmos Benczik
Originala esperanto poezio: Pál Avar
P. Neruda—M. Asturias: Manĝante en Hungario
Lajos Lesznai: Muzika vivo en 1919
G. Waringhien: Recenzo — Somermeznokta sonĝo
Gasta paĝo — Edwin de Kock
K. Kalocsay: Domfabriko
Paŭlo Balkányi: Vivi — kiel esperantisto
István Szerdahelyi: Metodo kaj metodoj
Grafikartisto: Kálmán Csohány
Vali Szabó: Panoramo
J. Szekeres: La Budapeŝta Internacia Foiro
Nia humuro
Leterkesto. Recenzo. Filatelo. Krucvortoj.

Alsenditaj libroj por recenzo

Hilda Dresen: Norda Naturo, poemaro. Stafeto, Beletraj kajeroj. Eld: J. Régulo. Paĝo 140 (Vidu la „Gastan paĝon".)

Edmond Privat: Vivo de Gandhi. Stafeto, Beletraj kajeroj. Eld: J. Régulo, p. 158.

F. Garcia Lorca, poemaro, trad: K. Gusev, Moskvo, 1968. p. 78. (Vidu la recenzon.)

Latva poezio 1945—1966. Eldonejo „Zvaigne", Riga 1968. p. 70.

Agadprogramo de la Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio, akceptita en plenkunsido de la CK de KPĜ la 5-an de aprilo 1968. Eld: Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato Kleriga Instituto Praha. P. 110.

Dua oficiala bulteno de la 54-a Universala Kongreso de Esperanto. Helsinki.

Cent himnoj, en traduko de Hans Amund Rosbach, p. 60.

Katalogo de la Hungarlando Esperanto Biblioteko, Szeged, p. 290.

D-ro István Szerdahelyi: Esperanto-lernolibro, por 10—14-jaraj infanoj, II-a volumo. Eld: Lernolibro-eldonejo, Budapeŝto, p. 227.

*

Ni petas la eldonistojn, bonvolu alsendi por recenzo du ekzemplerojn.

GLOSARO:

aneto:	spica kreskajo (Anethum gravedens L.)
bukto:	brikforma kuko bakita el fermentita farunajo kaj farĉita per marmelado
delekti:	plezurigi
friska:	malvarmeta
grioto:	acida ĉerizo
hojli:	tirboji
kiĉa:	pseŭdoarta, plaĉa nur al homo de malbona gusto
knelo:	manĝbulo
košmaro:	sonĝpremo, premsonĝo
kumulo:	(tomb)monteto
restaŭri:	restarigi, rekonstrui, ripari
sordida:	malpurega
puleo:	malaltstatura hungara gregopela hundo kun vatece densa hararo

Terroglobus

VAS ÉS ACÉL
TEK
VÁLLALAT

Entrepreno por fabrikado de feraj kaj ŝtalaj produktiloj

plej favora akirejo
de fermetalurgiaj produktaĵoj
por et- kaj mez- konsumentreprenoj

Alojitaj kaj nealojitaj ŝtaloj.
Ŝtaltuboj
Ŝtalŝnuroj
Najloj
Elektrodoj
Uzmaterialoj
Gisaĵoj
Lamenpecigo, laboratoriaj kontroloj
teknika servo por aĉetantoj
senpaga konsilado!

Vartrafikaj kontoroj:

Budapest VI. Lehel u. 3 b. Tel.: 205-480

Centra deponejo:

XV. Körvasut sor 110.
Deponejoj, magazenoj:
XIII. Dráva u. 13/15.
XIII. Vésző u. 11.
XIII. Révész u. 9.
VI. Liszt F. tér 9.
IX. Drégely u. 2/4.
IX. Drégely u. 3.
IX. Soroksári ut 34.
X. Maglódi ut 16.
XI. Hamzsabégi ut 69.
XX. Gubacsi hidfő 6.

Miskolc József A. u. 7.
Pécs Mecsekalja-Cserkút
Senpera mendoakcepto
tuja priservo en la supraj magazenoj!

Abono de HUNGARA VIVO en eksterlando

Peranto al eksterlando: KULTURA Budapest, 62, P. O. Box 149. — Sumoj de abonprezo por unu jaro, en pluraj ĉefaj valutoj: Usonaj dolaroj = 1,50; Kanadaj dolaroj = 1,50; sterlingaj funtoj = 0—11—0; okc. germanaj markoj = 6,40; svedaj kronoj = 7,80; norvegaj kronoj = 10,70; danaj kronoj = 10,40; italaj liroj = 940,—; belgaj frankoj = 75,—; svisaj frankoj = 6,60; francaj frankoj = 7,50; nederlandaj guldenoj = 5,50.

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

ANGLIO
Colle's Holdings Ltd., Denington Estate, London Road, WELLINGBOROUGH
The Danubia Book Co., 78 Shaftesbury Avenue, LONDON W. 1.

AŬSTRIO
Globus (VAZ), Höchstädtplatz 3, A—1200, WIEN I.
Rudolf Novák Gmbh., Köllnerhofgasse 4, A—1011, WIEN I.

AŬSTRALIO
Cosmos Bookshop, 133 Ackland Street, St. Kilda, Vic. A. Keesing, 168—174 Day Street, SYDNEY, N. S. W. 2000

BELGIO
Agence Messagerie de la Presse, Rue du Persil 14—22, BRUXELLES

BULGARIO
„HEMUS", Pl. Slawejkov 11, SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO
P. N. S. — dovoz tisku, Vinohradska 46, PRAHA 2.
P. N. S. — dovoz tisku, Leningradska 14, BRATISLAVA

DANLANDO
Ejnar Munksgaard, Prags Boulevard 47, COPENHAGEN/S.
Hunnia Books, Norrebrogade 182. I., COPENHAGEN/N.

SUD-AMERIKO
Livraria Brody Ltda., Caixa Postal 6366, SAO PAULO, Brazilo
Livraria D. Landy, Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943, SAO PAULO, Brazilo.
Luis Tarcsay, Calle Iglesia Ed. Villoria Apt. 21—105, C. 24. CARACAS, Venezuela

FINNLANDO
Akateeminen, Kirjakauppa, Keskuskatu 2, HELSINKI

FRANCIO
Agence Littéraire et Artistique Parisienne, 7 Rue Debelleyme, PARIS 3
Société Balaton 12 Rue de la Grande Bateliére, PARIS 9.

NEDERLANDO
Swets et Zeitlinger, Keizersgracht 487, AMSTERDAM C.

ISRAELO
Hadash, R. Nesz Ciona 4, TEL-AVIV
Lepac Ltd., 15 Rambam, TEL-AVIV
Gondos Sándor, Herzl 16, Bét Hakranot, HAIFA
A. Fischer, R. Strauss 3, JERUSALEM

JAPANIO
Nauka Ltd., 30—19, Minami-Ikebakukuro 2-chome, Toshima-ku, TOKYO

JUGOSLAVIO
Forum, Vojvode Misica broj 1, NOVI-SAD
Jugoslovenska Knjiga, Terazije 27. BEOGRAD

KANADO
Délibáb Film and Record Studio, 19 Prince Street West, MONTREAL 18. Que.
Pannonia Books, 2 Spadina Road, TORONTO 4, Ont.

ĈINIO
Watwen Shudian, P. O. B. Nr. 88. PEKING

POLLANDO
P. K. W. Z. Ruch. ul. Wronia 23, WARSZAWA

GERMANA DEMOKRATA RESPUBLIKO
Zeitungsvertriebsamt, Fruchtstrasse 3—4, 1004, BERLIN

GERMANA FEDERACIA RESPUBLIKO
Griff Verlag, Über der Klause 7, 8 MÜNCHEN 90
Kubon und Sagner, Schliessfach 68, 8 MÜNCHEN 34.
Kunst und Wissen, Postfach 46, Wilhelmstrasse 4, 7 STUTTGART 1.
W. E. Saarbach, Follerstrasse 2, 5 KÖLN 1.

NORVEGIO
A/S Narvesens Litteratur Tjeneste P. O. Box 6140 Etterstad, OSLO

ITALIO
Avv. Andrei Lazar, Via Monte delle Gioie 24, ROMA
S. Co. Lib. Ri., Piazza 33, ROMA

RUMANIO
OSEP, Gara de Nord, BUCURESTI
OSEP, ORADEA

SVISIO
AZED AG., Dornacherstrasse 60/62, BASEL 4200
Metropolitan Verlag, Binningerstrasse 55, ALLSCHWILLL

SVEDIO
A. B. Nordiska Bokhandeln, Drottninggatan 7—9, STOCKHOLM 1.
A. B. Sandbergs Bokhandeln, Sturegatan 8, STOCKHOLM 5.

SOVETUNIO
Sojuzpechatj. Import, Prospekt Mira 112-a MOSKVA

USA (Usono)
Center of Hungarian Litterature Inc., 1538 Second Ave., NEW YORK 10028
Corvin Travel and Gift Parcel Service, 1590 Second Ave., NEW YORK 10028
Stechert-Hafner Inc. 31. East 10th St., NEW YORK 10003
Magyar Áruház Könyv- és Lemezosztálya, 11802 Buckeye Road, CLEVELAND

VJETNAMIO
Phong Phat Hanh Bao Chi 17. Dinh Le. HANOI

KOREO
„Chul Bo" PHENJAN

Hungaroj abonu por eksterlandanoj laŭ la avizo sur la 1-a paĝo

medimpex

Hungara Eksterlandkomerca Entrepreno
pri Farmaciaj Produktaĵoj

Budapest, 5. • Poŝtkesto 126

EKSPORTAS-IMPORTAS

Farmaciaj specialaĵoj • Farmaciaj bazmaterialoj • Vakcinaĵoj por hom- kaj best-terapeŭtikaj celoj • Veterinaraj drogoj • Furaĝaldonaĵoj • Laboratoriaj kemiaĵoj • Biokemiaj produktaĵoj • Radioaktivaj produktaĵoj • Volatilaj oleoj • Kuracplantoj • Resanigaj kaj amaraj akvoj

90-jara estas

LA UZINO DE ELEKTRAJ APARATOJ GANZ

1878 GANZ

La produktaĵojn de tiu mondfama fabriko al 60 landoj eksportas

La Hungara Eksterland-komerca Entrepreno de Elektraj Aparatoj

TRANSELEKTRO

Budapest V., Münnich F. u. 13. POB. 377.

Telefono: 120—790